

Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-ro 570 (5)

MAJO 1953



(Foto : R.V.I. Zagreb)

Interesa detalaro el Škocjanska jama—grandega groto en Slovenujo
vidu paĝon 147

46a Jaro	Majo 1953	Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj, anoncetoj sendu al
N-ro 570 (5)		UNIVERSALA. ESPERANTO-ASOCIO Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo
Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio		
Fondinto : H. HODLER		Jara abono (1953) : 15 ŝil. anglaj (kun membreco kaj jarlibro 20 ŝil.) Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj
Redaktoro : HANS JAKOB Palais Wilson, Genève, Svislando		Tarifo por reklamoj : 1 paĝo £6 ½ paĝo £3 ¼ paĝo 30 ŝil. ⅙ paĝo 15 ŝil. Anoncetoj pri korespondado : 2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond- kupono por ĉiu duo da vortoj
Helpredaktoro : MASON STUTTARD		Legantoj en 80 landoj Eldonnumero 6000
Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.		



Enhavo

Specialaj artikoloj :	paĝo
La homo kaj la aŭtomobilo : <i>Henry Parland</i>	171
Infanoj lernu <i>unu</i> saman fremdan lingvon : <i>C. Stop-Bowitz</i>	157
La inunda katastrofo : <i>J. P. van Dijk</i>	162
Kion ni serĉas kaj trovas en grotoj ? <i>M. Gjivoje</i>	147
Kunvenis la Estraro de U.E.A. : <i>Hans Jakob</i>	145
OUN, UNESKO kaj Esperanto-Terminologio : <i>Prof. I. Lapenna</i>	153
La Rondo Familia : <i>E. de Wolf</i>	165
Satiro : <i>E. A. Haugen</i>	167
Tri datrevenoj : <i>Hans Jakob</i>	151
38a Universala Kongreso :	
Oficiala Komunikado n-ro 6	146
Poezio :	
La glavo de la tombloĝanto : <i>trad. B. Ragnarsson</i>	169
Konstantaj rubrikoj :	
Enigma konkurso	174
Esperantista Vivo	158
Internacia Konkurso	166
Nia Forumo	156
Oficiala Informilo	176
Radio kaj Esperanto	175
Tra la Libraro	159
Tra la Mondo Esperantista	149

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 570 (5)

Majo 1953



Kunvenis la Estraro de U.E.A.

KONFORME al la statuto de la Asocio la Estraro de U.E.A. kunvenis dum Pasko, 3–6 de Aprilo, en la Centra Oficejo, por ekzameni la staton de la aferoj, esplori aron da problemoj al ĝi submetitaj kaj fine decidi kio estu farata.

Ĉeestis sinjoroj Malmgren, Jakob, Kennedy, Prof. Lapenna kaj Oliver. Nia vicprezidanto, D-ro Kempeneers, pro malbonfarto ne povis ĉeesti la kunvenon.

La tagordo montris 68 traktotaĵojn plej diversajn. La plej grava punkto pridiskutita estis la agado sekve de la UNESKO-enketo, rea brilo de intereso por Esperanto flanke de plej alta instanco oficiala tutmonda. Kia ajn estos la rezultato de tiu-ĉi grava interveno oficiala, nia devo estas neniel malatenti ĝin kaj meti ĉion en la batalo por certigi venkon. Neniel ni lulu nin en iluzioj pri decidoj oficialaj koncerne problemojn de humaneca karaktero, defendataj de homoj sen materia povo. Ni havu fidon en la bono de nia ideo kaj ni ... laboru.

Alia ekstera afero ĉiam grava pro ĝia propaganda efiko estas la universala kongreso. Kun ĝojo la Estraro ricevis lastajn informojn pri

la preparoj de la 38-a Kongreso kiu rajtigas antaŭvidi brilan sukceson.

La estraro konsideris kaj diskutis la invitojn por la 39-a kongreso kaj konsentis akcepti tiun de Haarlem en Nederlando.

La raportoj de la unuopaj Estraranoj pri la laborkampo prizorgata de ili estas prezentitaj: Ĝeneralaj aferoj: la prezidanto; Serva Centro kaj publikigaĵoj: Hans Jakob; Centro de Esploro kaj Dokumentado: Prof. Lapenna; Rilatoj kun Fakaj Asocioj: D. Kennedy; Rilatoj kun Landaj Asocioj: D-ro Kempeneers kaj laste, tamen ne malpli grava S-ro Oliver pri Administrado kaj Financoj. Plej grandan intereson vekis la raporto de Prof. Lapenna kaj la ĝenerala danko venis ĉefe al li.

Se "lukto estas vivo" tiam nia movado estas vere vivanta laŭ la raportoj kaj vortoj aŭditaj kaj interŝanĝitaj. "Vivanta lingvo de vivanta popolo" oni prave povas proklami pri Esperanto, ĉeestante tiajn vere aferajn kunvenojn, sen lingva malhelpo, sen miskompreno pri vortoj. Spite la streĉan laboron la Estraranoj disiris preskaŭ kun bedaŭro; la scio esti plenuminta utilan laboron por ideala celo kompensis la foreston de ĉia distraĵo.

Hans Jakob.



38-a Universala Kongreso de Esperanto

25 julion—1 aŭguston, 1953

Poŝtfako 213, Zagreb, Jugoslavujo

Banka konto : Narodna banka, Zagreb, no. 402-T-844

N-ro 6

OFICIALA KOMUNIKO

Aprilon 1953

Kotizoj : La nova kaj plej alta tarifo por kotizoj validas de la unua aprilo. Restas nur tri monatoj en kiuj aliĝi al la kongreso. La L.K.K. atentigas denove al la fakto ke post la 30-a de junio ĝi malakceptos ĉiujn aliĝojn. La aliĝiloj devos esti en Zagreb je tiu dato. Ne risku ĉagrenon, sed aliĝu tuj.

Mendoj : La du ilustritaj prospektoj de la entrepreno TURIST (kies adreso estas Zrinjevac 18, Zagreb) jam estas senditaj al ĉiuj aliĝintoj al la kongreso. Provizo krome estas sendita al ĉiu peranto, kaj al ĉiu landa asocio. La L.K.K. atentigas al kongresanoj, ke TURIST ne traktos mendojn, kiuj atingos ĝin post la 15-a de junio, nek mendilojn kiuj ne havas atestilon de banko pri la enpago en ĝian konton. Kongresanoj kiuj vojaĝos al Zagreb en karavano, faru la aranĝojn per sia karavanestro. Nepre ne skribu al la L.K.K. pri mendoj !

Vizoj : La koncerna ministerio informis ke ĉiuj kongresanoj estas rigardataj kiel "turistoj" kaj ricevos tian vizon. Sekve kiam oni petos vizon por Jugoslavujo, nepre menciui, ke temas pri vizito al la Esperanta kongreso. Rilate al vizoj, ne estas necese, ke oni posedu invitan leteron el Jugoslavujo (kiel skribis al ni iuj samideanoj).

Dogano : La L.K.K. atentigas, ke vojaĝantoj devas pagi imposton por

ĉiuj varoj, kiuj ne estas "personaj". Krome, por tiuj kiuj eble pripensas sendi paketojn en Jugoslavujon, atentui, ke la enlanda ricevonto devas pagi bazan imposton de 200 din. por ĉiu aparta paketo antaŭ ol ricevi ĝin, kaj eventuale rilatan imposton por la varo je ricevo.

Oratora Konkurso de U.E.A. : La temo por la 38-a U.K. estas : "La rolo de Esperanto en la internacia proksimigo de la junularo". La kondiĉoj de partopreno troviĝos en la Kongresa Libro jam nun en preparo.

Postkongreso : La organiza komitato de la Postkongreso en Ljubljana presigis informan prospekton kun ĉiuj detaloj. Ĝi estas sendita al ĉiuj aliĝintoj al la 38-a U.K. Ekzempleroj estas haveblaj ĉe : Esperanta Postkongreso, Miklošičeva 7, Ljubljana, Jugoslavujo.

Statistiko (ĝis 31 marto) : Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 35, Belgujo 3, Brazilo 2, Britujo 92, Danlando 29, Finnlando 8, Francujo 107, Germanujo 64, Gvatemalo 1, Hispanujo 1, Italujo 17, Izraelo 1, Jugoslavujo 419, Maroko 1, Nederlando 31, Norvegujo 12, Novzelando 2, Pollando 1, Portugalujo 1, Svedujo 68, Svislando 25, Turkujo 1, Usono 5, Venezuelo 1. Sume 929 el 26 landoj (pasintjare 960).

Mason Stuttard,
Konstanta Kongresa Sekretario.

Marinko Gjivoje :


Kion ni serĉas kaj trovas en grotoj ?

AL la homo, precipe se li aŭ ŝi eniras tien la unuan fojon, ĉi tiuj mallumaj kaj malsekaj ejoj de la Plutona subtera regno enverŝas en la animon ian vanan timon ligitan kun mistiko kaj teruro. Tial ne miru, ke Dante imagis ĉiujn teruraĵojn de sia Infero en iu groto apud Soĉa. La homo, kiel estaĵo vidanta, preferas sunlumon ol mallumon. Pro tio li memkompreneble ĉiam timis kaj abomenis grotojn. Ĉar la "timo havas grandajn okulojn" preskaŭ ĉiu groto estas firme ligita kun ia stranga fabelo.

Malgraŭ tio niaj praaj antaŭuloj-vaguloj trovis en la duonlumaj enirejoj de multenombraj grotoj kaj kavernoj sekuran rifuĝon dum la

glacia epoko kaj la longedaŭraj tempestaj vintroj kiuj etendiĝis super vasta parto de nia terglobo en la pratempo. Aldonendas, ke ankaŭ dum la milito rifuĝis en kavernoj la militistoj, vunditoj kaj alispeca loĝantaro antaŭ la malamiko. Kelkan tempon en iu groto apud Drvar Marŝalo Tito kun sia ĉefa stabo hejmis. Post atako de germanaj paraŝutistoj sur Drvar ili translokiĝis al la insulo Vis. Sub la plej alta supro de Vis, nomita Hum, troviĝas du grotoj, kiuj estis adaptitaj por la ĉefa stabo kaj kie Marŝalo Tito restadis ĝis aŭtuno 1944.

Ekzistas du ĉefaj kategorioj de groto : grotoj kun fluanta akvo, kaj grotoj sekaj, senakvaj grotoj.



(Foto : Speleologia sekcio, Zagreb)

Surplafona detalaro en antaŭnelonge malkovrita groto Vrelo en Fuzine, Kroatujo

Ordinare la sekaj grotoj estas mallongaj kaj pli longaj estas tiuj, tra kiuj fluas subteraj akvoj. Grotoj povas ankaŭ esti apudmaraj (Kaprien Italujo, Blua Groto en Dalmatujo) vulkanaj, glaciaj, grotoj kun etaĝoj (Postojna) kaj kolombaj grotoj. Grotoj kun ostarejoj estas gravaj precipe por la antropologo.

Kion interesan trovas la speleologo (grotesploranto) en tiu aparta mondo, kie ne ekzistas ia ŝanĝo inter tago kaj nokto, inter la temperaturo de akvo kaj tero en vintro kaj somero? Kion interesan trovas la montgrimpantoj, naturamikoj, natursciencistoj kaj arkeologoj?

Krom diversspecaj stalagmitoj kaj stalaktitoj, “drapiraĵoj” kaj aliaj okulplaĉaj naturaj ornamaĵoj en diversaj altecoj, diametroj kaj koloroj, kiuj unuavide tre forte impresas, ni serĉas kaj ofte trovas tie altvaloran sciencan materialon. Ekzemple prahomoj kaj antaŭhistoriaj homoj lasis al ni en tiuj domoj de la naturo la postsignojn de sia primitiva vivo kaj laboro. En pluraj francaj kaj hispanaj grotoj oni trovis la unuajn provojn de la arto, de la prahistoria arto.

La natursciencisto montras tie intereson por la faŭno (t.e. grota bestetaro). La etaj insektoj vivantaj konstante en malluma terinterno posedas rudimentojn de okuloj, kaj niaj grotoj estas vera trezorejo de tiaj strangaj estaĵoj. Mi menciis nur la konatan amfibion Proteon (*Proteus angvineus*) havantan la jenan mirindan econ, ke ĝi ovonaskas se ĝi vivas en akvo de 9 gradoj Celsiaj, kaj akuŝas idojn senpere sen ovo se ĝi vivas en akvo de 12° C. Sed en grotoj vivas ankaŭ vespertoj, skorpioj, skolopendroj, strigoj, araneoj kaj kankretoj. La famekonata speleologo

Absolon en 610 lokoj konstatis 1600 diversajn specojn.

La arkeologoj kaj antropologoj malkovras en dikaj tertavoloj de grotoj postsignojn de antaŭhistoriaj enloĝantoj, kiel ekzemple diversajn ilojn (klinojn de sagoj, elŝtonajn hakilojn, skrapilojn, borilojn, alenojn, prilaboritajn ostojn), ostarojn de bestoj kaj homoj kaj ceramikaĵojn. El la antaŭhistoria tempo, kiu ne havis skribitajn monumentojn kaj dokumentojn, ni ĉerpas detalojn sole el tiaj elfosaĵoj. Krom tio ni trovas tie la vestejojn de primitivaj enloĝantoj: ostajn, bronzajn kaj sukcenajn ornamaĵojn, kaj sur la muroj gravuritajn kaj pentritajn manifestadojn de la arto, reprezentantajn grandparte la bestojn (bizonojn, ĉevalojn, cervinojn k.s.). Laŭ la trovitaĵoj ni povas sekvi la evoluon de diversaj periodoj.

Fine mi devas substreki, ke malmultaj estas la landoj en la mondo, posedantaj tian amason da diversaj grotoj, kiel Jugoslavujo. Postojna—unu el la plej grandaj kaj interesaj grotoj en Jugoslavujo—estis vizitata de multaj partoprenintoj de la 38-a Universala Kongreso en Zagreb, kiuj veturos interne de la groto per miniatura subtera fervojo. Ĝi estas aparta ĉapitro!

KARTA ENCIKLOPEDIO

Kulturhistoriaj kuriozaĵoj

20 kartoĵoj kostas 2 ŝil. 6p.
(8 rpk.)

Mendu ĉe U.E.A.



Tra la Mondo Esperantista



Brazilo

La 25an de januaro la Esperanto-Klubo "Zamenhof" en São Miguel Paulista festis la 4an datrevenon de sia fondiĝo. En tiu mallonga tempo la klubo fariĝis potenca faktoro en la urba vivo, precipe pro la firma koro de junaj membroj. Dum la festo profesia aktorino Norma Guerrini kaj aliaj interpretis poezion kaj kantojn Esperantajn. Fervoraj paroladoj, balo kaj multvizitita ekspozicio estis aliaj allogaĵoj.

Danlando

Dana Internacia Studentkomitato kunlabore kun Internacia Federacio de Esperantistaj Studentoj aranĝos denove internacian arkeologian tendaron. Ĉar la pago ĉi jare estas reduktita ĝis nur 20 d. kr. oni atendas multajn partoprenantojn. La aranĝo komenciĝos la 13an de julio. Krom la laboro okazos multaj interesaj vizitoj, prelegoj kaj ekskursoj. Oni laboros 6 horojn tage, loĝos kaj manĝos en hotelo.

Ĉiuj gestudentoj, altlernejoj, seminarianoj, k.s. povas partopreni la tendaron, sed ili devas flue paroli Esperanton. Estas tre grave ke interesatoj tuj aliĝu, ĉar se minimume 15 partoprenantoj ne aliĝis ĝis la 15a de majo la tendaro ne okazos.

La dana ŝtato donis dum la kvar lastaj jaroj 25,000 d. kr. al tendaroj por Esperantistaj studentoj, kaj estus domaĝe se tiu aranĝo ne povus okazi pro manko de partoprenantoj. Petu

senpagan programon ĉe Dana Internacia Studentkomitato, La Universitato, Sct. Pederstraede 19, Kopenhago K.

Germanujo

La laborplano de la Popola Universitato de Düsseldorf citas sub Fremdlingvaj Kursoj tiujn pri Esperanto gvidataj de nia Delegito, Joseph Haus.

Internacia Ferio-semajno en Konstanz. Por la dua fojo samideanoj en Konstanz invitas la Esperantistaron al Internacia Ferio-semajno okazonta je 18-24 julio, 1953. La programo de tiu aranĝo enhavas ekskursojn en la regiono de la Lago Konstanco, al Aŭstrujo kaj Svislando, prelegojn, viziton al opereto kaj perfektigan Ĉe-metodan Esperanto-kurson. Esperanto-strato estos inaŭgurita dum la semajno.

La kosto por la semajno estas 100 DM, ĉio enkalkulita; la aliĝlimo estas la 1an de julio. Ilustrita invitilo, Esperanto-bildprospekto kaj ĉiuj informoj estas haveblaj ĉe IFS Esperanto, Grüngang 8, Konstanz, Germanujo.

Hispanujo

En la revuo *Valencia Atracción*, monata organo de la oficejo por turismo en Valencia, ĵus aperis tre interesa dupaĝa esperantlingva artikolo pri la tipa Festo de la Fajro en la urbo. Tiu artikolo estas aparte eldonita sur luksa papero kun ilustraĵoj, kiel prospekto, kiun oni

senpage liveros al ĉiu eksterlanda petanto. Oni skribu al jena adreso: Sociedad Valenciana Fomento del Turismo, Bajos del Ayuntamiento, Valencia, Hispanujo.

Italujo

D-ro O. Nanni gvidas kurson de Esperanto en la Universitato de Bologna, laŭ permesiga cirkulero de la Ministro de la Publika Instruado kaj kun aprobo de la Rektoro. La Akademia Senato de la Universitato estis voĉdoninta deklaron favoran al Esperanto. Multaj aliaj kursoj okazas en diversaj urboj nuntempe kaj la Esperanto-movado en Italujo ŝajnas bone progresi.

Nov-Zelando

Bonsukcesa ekspozicio okazis en nordinsula urbo Tauranga en la monato februaro kaj la Teknika Kolegio komencis vesperkursojn en Esperanto. La sukceso estis aparte surpriza kiam oni konstatas ke Nov-zelando estas unulingva lando, kie oni nur malofte renkontas la lingvan problemon.

Svedujo

La Etnologia Arkivo de la Universitato de Lund, kiu je siaj demandoj rilate al la konsumado de ĉevalviando ricevis ne malpli ol 90 respondojn el 35 landoj, volas ĉikune al ĉiuj kiuj kunlaboris transdoni sian dankon. Tiuj efikeco kaj rapideco per kiuj la informoj alvenis, kaj tiu zorgemo per kiu la informdonantoj agis, meritas ĉiajn atenton kaj laŭdon. Estis granda avantaĝo povi uzi Esperanton kaj ĝian delegitsistemon por la kolektado de ĉispeca materialo. Ni ankaŭ petas, ke tiuj kiuj uzis helpon de kunlaborantoj, al ili esprimu la dankon de la institucio.

UNIVERSITATO DE LUND

Etnologia Arkivo

Sigfrid Svensson—Brita Egardt

Svislando

Kiel kutime la Svisoj jarkunvenis en la printempo kaj je la 8a de marto pli ol 80 membroj (40% de la membraro) kolektiĝis en la hejmeca hotelo Metropol, Bern, por la SES-Tago.

La plej grava laboro estis diskuto, en ĉeesto de la honora prezidanto D-ro Privat, pri la problemoj rilate al la enketo de UNESKO. Malgraŭ la fakto ke en tiu lando ne estas unu instru-departemento sed 25 (unu por ĉiu kantono), SES ĉiel klopodos ke la respondo de la landa registaro estu favora.

Por disponigi pli da rimedoj por propagando la gazeto estonte pli modeste eldoniĝos, kaj kun la sama celo la sumo budĝetita por 50-jara jubilea festo estis forstrekita. CED ricevu subvencion. Nova prezidanto estas Hans Herrmann el Bern. S-ro J. Gilliard pro grandaj servoj al la movado nomiĝis Honora Membro.

La plej interesa programero estis parolado de D-ro Privat, kiu prezentis la problemojn de la juna generacio en nia movado de multaj grizharuloj. Por klarigi la nunan gravan UNESKO-problemon li skizis la antaŭajn klopodojn ĉe la ligo de Nacioj. La nuna favora stato postulas ĉiajn streĉojn por atingi sukceson ĉe la venonta kunsido de UNESKO en Montevideo. Ni povos atingi sukceson se ne tro malhelpos naciemaj kaj influaj diplomatoj.

Usono

La 43a Kongreso de la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko okazos en New York de la 26a ĝis la 29a de junio 1953. En la posttagmezo de la lasta tago la kongresanoj vizitos la sekretariejon kaj la aliajn

fino sur paĝo 155



Tri datrevenoj—Tri homoj
Tri agadoj
por unu celo

NI vivas en tempo de datrevenoj en nia movado, ĉu tiaj pri gravaj eventoj, ĉu tiaj pri eminentuloj. Ideo kiel tia pri internacia lingvo, tiom opozicia je tradicioj akceptitaj silente, ŝuldas multon al tiuj homoj, kiuj sen konkreta profito, ja eĉ kontraŭ propra intereso materia laboras por idealo, baraktas kontraŭ inerteco de l' publiko, persistas kaj foje rikoltas dankon, eble eĉ rekonon. Ne estas do ia mendita glorlaŭdo se ni de tempo al tempo dediĉas kelkajn liniojn al homoj sin donintaj korpe kaj anime por nia ideo kaj nia idealo. Prezentiĝas nun okazo memorigi la legantaron pri—tri datoj, tri homoj kaj tri agadoj—kiel citas la titolo.

Pasintan februaron, Kortega Konsilisto (Hofrat) Hugo Steiner, fariĝis 75-jara. Maljuniĝinta laŭ jaroj li konservis viglecon kaj iniciatpovon de junulo. Spite ĉiajn seniluziigojn (kiu agema homo ne spertas ilin?) Hofrat Steiner preskaŭ fanatike sekvis celon kiun li fiksis al si: nome, ke Vieno estu vivanta centro de Esperantismo! Estas dudek kvin jaroj, de kiam li komencis la kreon de la

Internacia Esperanto-Muzeo. Komence priridita de iuj, la ideo de samideano Steiner sukcesis. La Muzeo, parto de la Nacia Biblioteko, troviĝas en la Imperiestra Kastelo (Hofburg) kaj neniu bezonas cerbumi pri loko, digna por la kolektoj tie kunigitaj. La dua ideo de samideano Steiner estis lokigi apud la muzeo, honor-salonon aŭ Panteonon de la Esperanto-Movado. Pri ĝi ĉiuj ja legis. Ideo kaj plenumo identas, ambaŭ estas laŭdindaj kaj la iniciantinto rajte "darfas" fieri pri tio kion li sukcesis. La tria iniciato estis la Zamenhof-Monumento en la idilialoko tirola, Wörgl, kies inaŭguron oni festis pasintan jaron. Post tiaj sukcesoj, atingitaj plej ofte kontraŭ videbla opozicio de enviuloj, la vortoj de danko ja estas nenio. Sed kion ni deziras estas ke Hofrat Steiner konservu tiun ĉi energion—por multaj jaroj—je la bono de nia movado.

De Vieno ni iru al Ĝenevo. Antaŭ pli ol kvindek jaroj defendis la ideon de Internacia Lingvo la ĝeneva filozofo Ernest Naville kaj prezentis raporton pri ĝi al la Franca Akademio de Sciencoj, sekvita en 1901 de dua raporto prezentita de Charles Méray kaj Generalo Sebert. Tiutempe la gazetaro multe parolis pri tio kaj aro da personoj estis instigitaj interesiĝi pri Esperanto. Du kolegianoj

(gimnazianoj) en Ĝenevo apartenis al tiuj : H. Hodler kaj Edmond Privat. En jaro 1903 la du komencis labori aktive kaj—ho kia aŭdaco !—eldonis periodaĵon, presaĵon tre bele skribitan per mano kaj multobligitan, poste presitan. “Juna Esperantisto” kun sama ĝuo legita de junuloj kiel de maljunuloj montris jam la talenton de la ĉefa redaktoro : Edmond Privat. Hodiaŭ, duonjarcenton poste, li povas rerigardi je agado seninterrompa por Esperanto. Oratoro, verkisto, subtila lingvisto kaj ideriĉa iniciatinto, tiel ni konas lin. Krom lia agado por Esperanto, Doktoro Privat aktive partoprenas en humanecaj movadoj, por forigi socian kaj rasan maljustecon. Kiu jam havis okazon ĉeesti kunvenon preziditan de Edmond Privat, kiu, vera poligloto sciis regi situacion konfuzan kaj trovi elirvojon, tiu revenis hejmen kun la impresoj esti renkontinta estron. Neniam mi forgesos la komenton, kiam en la Komisiono de la Ligo de Nacioj Doktoro Privat (kiel konsilanto de la Persa Registaro) defendis la tezon esperantistan. En momento kiam eĉ plej pacema homo ekscitiĝus, aŭdinte la insultojn de iu Ministro kontraŭ nia afero, Privat kun eksterordinara memregeco rifutis punkton post punkto kaj gajnis la simpation de la ceteraj anoj de la Komisiono. Ni kredis tiam, esti je decida momento, sed la subteraj fortoj estis pli potencaj. La Ligo de Nacioj pereis, sed Esperanto restis.

*Edmond Privat—la dolĉa vorto
Plej mola ĉarmo kaj gracio !
Poeto de la Historio
Pri l' Majstro kaj pri nia Forto.*

Ni kunvenos nunjare por la unua fojo en la slava sudo, en la kroata ĉefurbo Zagreb. Ne multon oni scias

kutime en okcidento pri la landoj sude de la Danubo. Escepton en tiu ĉi malkono faras tamen la Esperantistoj, efektivaj civitanoj de l' mondo.

Estis antaŭ 25 jaroj ke aperis inter la Esperantistoj en Zagreb, kolegiano altstatura, temperamenta, kiu metis oleon en la preskaŭ estingiĝinta fajro de la Esperanto-movado jugoslava. La celkonscian agadon de tiu ĉi junulo kronis sukceso kaj baldaŭ lia nomo aperis en la internacia sfero. Sagaca, akresenta juristo, sperta debatanto, tiel li estas konata hodiaŭ. Facile diri kiu li estas : D-ro Ivo Lapenna, Estrarano de U.E.A., kreinto de la Centro de Esploro kaj Dokumentado. Ni sciiĝis pri la granda sukceso, pene atingita pasintjare en Parizo, dank' al li kaj samideano Durrant helpataj efike de D-ro Privat. Kiu konas internaciajn konferencojn diskutantaj problemojn de tutmonda graveco, scias kion signifas tiurilate “atingi ion konkretan”. Nu, en Profesoro Lapenna, nia movado havas hodiaŭ la “ĝustan viron je ĝusta loko” kaj ne estas malfacile antaŭdiri : De Ivo Lapenna ni rajtas atendi multon.

Jen tri homoj laborantaj ĉiu en difinita medio, ĉiuj de malsama deveno, malsama formado. Ilin kunigas unu ideo kaj ili laboris kaj ankoraŭ longe laboros por la celo kara al ni ĉiuj : Doni al la civilizita homaro la praktikan eblecon interkompreniĝi rekte por krei la bazon de harmonia kunlaboro interpopola.

*Feliĉe la semanto estas,
Printempe kiu semis grenon
Kaj en aŭtuno ĝoje festas,
De bonrikolto la solenon.*

Hans Jakob.

OUN, UNESKO kaj Esperanto-Terminologio

Doktoro William Solzbacher, membro de la Akademio de Esperanto, publikigis en la revuo *Amerika Esperantisto* (Januaro-Februaro, 1953) interesan artikolon pri la supra temo. En ĝi li pledas por la formoj *Unuigitaj Nacioj* anstataŭ *Unuiĝintaj Nacioj* kaj *UNESCO* anstataŭ *UNESKO*. Krome, li trovas “stranga” la mal-longigon OUN (por Organizo de Unuiĝintaj Nacioj), kiun uzis CED en unu el siaj cirkuleroj kaj en la aldonita artikoleto por la nacilingva gazetaro.

(1) *Unuiĝintaj Nacioj*.—Estas vero, ke en la 5 oficialaj lingvoj de la Organizaĵo oni ne uzas la refleksivan formon por ĝia nomo. Estas, tamen, ankaŭ vero, ke en la angla, franca, hispana kaj ĉina lingvoj tia formo tute ne ekzistas. La nomo de la Organizaĵo estas en la franca *Nations Unies*, en la angla *United Nations*, en la hispana *Naciones Unidas*. En la ĉina lingvo la nomo estas *Lien Ho Kuo*, kion Doktoro Solzbacher laŭvorte tradukas per *Unuigo-Nacio*. Sekve, pro la neperfekteco de tiuj lingvoj, oni tute simple ne povas esprimi en ili la ideon de *Unuiĝintaj Nacioj* per speciala formo, sed oni devas diri *Unuigitaj Nacioj*. Aliflanke, ĝuste la manko de tiu speciala formo por esprimi la refleksivecon, estas la kaŭzo, ke la pasivaj formoj tute ne havas en tiuj lingvoj la rigoran sencon de nura pasiveco. Sole el la kunteksto oni povas vidi ĉu temas pri *-iĝinta* aŭ pri *-igita*. Kiam en franca dokumento—por preni similan ekzemplon—oni legas “*moi soussigné*” (aŭ en itala “*io sottoscritto*”, aŭ en la kroata “*ja polpisani*” k.t.p.), tio evidente ne

signifas, ke la subskribinto estas subskribita de iu alia, sed ke li mem tion faris. Ĉar Esperanto posedas ambaŭ formojn kun absolute preciza signifo kaj tial egala valoro, oni devas diri *subskribinta* kaj ne *subskribita*. Same tiel dependas de la senco, kiun donas la kunteksto, ĉu oni tradukos en Esperanton per *ruĝiĝo* aŭ *ruĝigo*, per *unuigo* aŭ *unuigo* k.t.p. la paralelajn ideojn, kiuj en la grandega plimulto de naciaj lingvoj preskaŭ ĉiam estas signitaj nur per unu, per la sama vorto.

Doktoro Solzbacher diras, ke “traduko de oficiala termino ne estas taŭga okazo por demonstracii, ke en Esperanto vi povas diri ion, kion vi ne povas diri en nacia lingvo”. Li aldonas, ke, cetere, en la rusan lingvon oni estus povinta traduki *Unuiĝintaj Nacioj* per *Objedinjavšiesia Nacii*, sed ke la oficialaj tradukistoj “prave kaj saĝe ne tradukis tiel”. Tio por D-ro Solzbacher estas plia argumento por lia tezo.

Unue mi diru, ke la oficialaj tradukistoj de la rusa lingvo faris plurajn erarojn en sia traduko de la Ĉarto. Tial la oficiala rusa teksto de la Ĉarto en kelkaj punktoj ne respondas al la same tiel oficiala teksto en la aliaj lingvoj. Tamen, la traduko de la nomo per *Objedinenije Naciji* (Unuigitaj Nacioj) estas tute korekta. Kvankam, nome, la rusa lingvo posedas la refleksivan formon, kiu respondas al la Esperanta *-iĝanta* aŭ *-iĝinta*, tamen en la rusa lingvo tiu formo ne estas tiel “egalrajta” kun la pasiva formo, kiel ni tion havas en Esperanto inter *-igita* kaj *-iĝinta*. La spirito de la rusa lingvo faras, ke en

tiu ĉi okazo oni ne povas uzi la refleksivan formon (parenteze estu dirite, ke tiu formo neniel povus esti *Objedinjavŝiesa*, kiel tradukis D-ro Solzbacher, sed *Objedinivŝiesa*), sed devas uzi la pasivan. Tamen, tiu sama spirito faras, ke ĝuste tial la pasiva formo en tiu ĉi okazo ne respondas rigore nur al la Esperanta *-igita*, sed ankaŭ al *-iginta*. Do, tute sama situacio, kiel en la aliaj oficialaj lingvoj de la Organizaĵo.

La Organizaĵo estas unuiĝo (ne unuigo) de suverenaj ŝtatoj, kiuj libere kaj propravole unuiĝis por atingi precize fiksitajn celojn. El la tuta Ĉarto kaj el la aktiveco de la Organizaĵo sur ĝia bazo, tio estas klare videbla. Tial — ne por demonstracii, sed por traduki korekte—estas necese, laŭ mia opinio, diri en Esperanto *Unuiĝintaj Nacioj*. Tiu esprimo estas konforma al la propra spirito de la Internacia Lingvo. Traduki bone ne signifas traduki laŭvorte, sed reprodukti en alia lingvo la precizan sencon de la ideo. Ĉi tie tute ne temas, kompreneble, pri tio, ke oni povus diri en Esperanto ion, kion oni ne povus diri en la naciaj lingvoj. Temas nur pri tio, ke en la oficialaj lingvoj de la Ĉarto oni povas esprimi nur per unu formo du diferencajn ideojn, kiuj en Esperanto — pro ĝia pli granda perfekteco—estas esprimeblaj per du diversaj formoj. Jen ĉio.

(2) *OUN*.—Mi scias tre bone, ke la nomo de la Organizaĵo estas *Unuiĝintaj Nacioj*. En mia verko *Aktualaj Problemoj* (p. 109) mi skribis: “Kvankam la nomo estas nur Unuiĝintaj Nacioj, tamen en la praktiko, precipe en la gazetaro, oni kutime ĝin nomas Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj, aŭ, mallongigite, OUN.” Kiam CED sendas artikolon

aŭ informon por la taggazetaro, tiam ĝi, kompreneble, adaptiĝas al la skribmaniero de tiu gazetaro. Estas ĝenerale konate, ke la Organizaĵon oni kutime nomas en ĉiuj gazetoj de la mondo “Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj”. Ĉar la celo de CED ne estas instrui la gazetojn pri la nomo de la Organizaĵo, CED en la menciitaj cirkulero kaj artikoleto uzis la nomon, kiun oni kutimas doni al Unuiĝintaj Nacioj. La Esperanta mallongigo OUN povas ŝajni “stranga” nur al personoj, kiuj legas nur britajn, usonajn aŭ aliajn anglalingvaj gazetojn. Personoj, kiuj legas la francajn gazetojn, scias bone, ke la koncerna mallongigo estas en la franca lingvo ONU. Tiuj, kiuj legas la rusajn, trovos, ke la mallongigo estas OON. En ĉiu lingvo oni donas tian mallongigon, kiu respondas al la nacilingva nomo de la Organizaĵo. Sekve, ankaŭ en Esperanto oni devas agi same. En la Internacia Lingvo la mallongigo povas esti nur OUN kaj neniel UNO, ĉar UNO estas mallongigo de la angla “gazetara” nomo de la Organizaĵo.

(3) *UNESKO*.—En Esperanto la litero “c” estas ĉiam legata “ĉ”. Nur en lingvoj, en kiuj “c” estas legata kiel “k” antaŭ la literoj “a”, “o” aŭ “u”, oni devas skribi *UNESCO*. En la aliaj lingvoj, ekzemple en la rusa, serba, kroata, slovena k.t.p., oni ĉiam skribas *UNESKO*, kaj tio estas tute korekta, ĉar tiamaniere oni agas konforme al la reguloj de la koncernaj lingvoj. Same tiel en Esperanto oni devas skribi *UNESKO*.

Estas konate, ke UNESCO estas mallongigo de la anglalingva nomo de la Organizo de Unuiĝintoj Nacioj por Eduko, Scienco kaj Kulturo. Sed la vorto UNESCO eniris kiel *UNESKO* en ĉiujn lingvojn de la

mondo kaj ĝi estas ĝenerale uzata kiel tia, nome kiel memstara vorto, perdinta la karakteron de mallongigo. La grandega plimulto de personoj, kiuj hodiaŭ tra la mondo uzas tiun vorton tute ne pensas al ĝia deveno kaj ofte eĉ ne scias ĝian originon. En kelkaj lingvoj—ekzemple en la kroata—oni deklinacias ĝin tute same, kiel oni tion faras kun la aliaj vortoj, finiĝantaj je -o (UNESKO, UNESKA, UNESKU k.t.p.) Ankaŭ tio pruvas, ke la vorto memstariĝis.

UNESKO ne estas la nura tiaspeca vorto. Ni havas, ekzemple, la vorton *kolĥozo*, kiu devenas de la rusa *kolektivnoje hozajstvo* (kolektiva mastrumado). Ankaŭ ĝi eniris kiel memstara vorto en ĉiujn lingvojn. En Esperanto, kompreneble, oni skribas ĝin tiel, kiel oni devas ĝin skribi laŭ la reguloj de nia lingvo. La samon oni faras en ĉiuj aliaj lingvoj. Tamen, neniuj trovas, ke tio “ridindigas” la koncernajn lingvojn “en la okuloj de eksterstarantaj personoj”, kiel tion pensas D-ro Solzbacher pri Esperanto, se oni skribas en ĝi UNESKO anstataŭ UNESCO. Laŭ mia opinio estus vere ridinde skribi en Esperanto UNESCO, ĉar en tiu okazo oni devus legi tiun vorton ĝuste tiel, kiel ĝi estas skribita. Kaj tio fakte estus ridinda.

*Prof. Ivo Lapenna,
Membro de la Akademio
de Esperanto.*

Tra la Mondo Esperantista—*fino*.

konstruaĵojn de la Unuigitaj Nacioj. La Helpa Ĝenerala Sekretario de UNO, S-ro Benjamin Cohen, al kiu en 1950 Esperantista delegitaro prezentis la Esperanto-petskribon, kaj S-ro Solomon V. Arnaldo, Direktoro de la oficejo de UNESKO en New York, faros paroladojn por la Esperantistaj vizitantoj.

Dum la Kongreso la Prezidanto de EANA, D-ro William Solzbacher, raportos pri impresoj dum sessemajna vojaĝo tra Eŭropo. La LKK preparas ankaŭ ŝipekskurson, bankedon kaj aliajn allogajn aranĝojn.

Internacia Esperanto-Muzeo en Wien

IEMW deziras eldoni en julio 1953 Adresliston de la Veteranoj, tiuj farinĝintaj Esperantistoj antaŭ 1914. La veteranoj sendu al ni siajn foteton, vivokuron kaj adreson, se eble aerpoŝte. Ni transdonos la adresojn al la sekretario de la Veterana Esp.-Klubo, S-ro M. Lewin, 33 Kingscroft Avenue, Dunstable, Beds., Anglujo, kiu kontraŭ 4 rpk. sendos la VEK-insignon. Aneco al VEK estas senpaga. La eldonota VEK-adreslisto kostos 2 rpk. sendotaj al IEMW.

“Informilo de IEMW” aperas kvarfoje jare kaj kostas 6 rpk., kaj senplua pago oni fariĝas subtenanta membro de la Muzeo. Adreso: Internacia Esperanto-Muzeo, Hofburg, Batthyanystrasse, Wien I, Aŭstrujo.

Unu el la plej interesaj libroj en Esperanto estas

SOMERA UNIVERSITATO (Malmö, 1948)

Prezo 4 ŝil., afr. 2p. (12 rpk.)

Mendu ĉe UEA aŭ enlanda libroservo

Nia Forumo

PAROLAS LA LEGANTOJ

Korespondantoj nepre esprimu sin koncize kaj mallonge. Antaŭ ol sendi leteron por publikigo kontrolu la longon per komparo kun jam presita teksto.

Presigo de letero de korespondanto ne necese signifas ke U.E.A. oficiale subtenas la esprimitajn opiniojn.



Grava peto

Estis en la jaro 1904, kiam Prof. Th. Cart aperigis la unuan numeron de "Esperanta Ligilo", la brajla gazeto de la blindaj Esperantistoj. Tio estis la komenco de la internacia blindul-Esperantista movado, kiu do sekvontjare festos sian kvindekjaran jubileon.

Okaze de la 24a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj, en la kadro de la Universala Kongreso de 1954 en Nederlando, mi intencas, se eble, prezenti skizon pri ĝia historio. Por ke ĝi fariĝu kiom eble plej kompleta mi alvokas la helpon ankaŭ de niaj vidantaj gesamideanoj, kiuj bonvoleme povas kaj volos helpi. Afable mi petas, ke ĉiu, kiu havas tiurilatajn dokumentojn, gazetojn, leterojn, k.t.p., aŭ scias pri ili en muzeo, bonvolu pruntesendi ilin al mi aŭ informi min. Sincere mi promesas akurate resendi ĉion. Kaj mi tre ĝojos, se iu, havante rememorojn pri nia blindula movado, pri niaj kongresoj, pri vidantaj aŭ blindaj samideanoj laborintaj aŭ laborantaj en nia movado, komplezeme skribos tion al mi, ĉu pri evidente gravaj, ĉu pri ŝajne malgravaj aferoj. Precipe mi petas ankaŭ la pli aĝajn inter ni rakonti pri la unua periodo de nia agado, kiun mi mem travivis. Mi kore antaŭdankas.

R. Israëls,
2e Exloërmond, Nederlando.

Pri recenzo

La recenzo de d-ro Szilágyi pri nia libro *Kvaropo* estas tiel favora, ke mi riskas akuzon pri maldankemo se mi ĉikanas detalojn. Tamen mi riskas; amiko Szilágyi certe komprenos mian sinceran motivon.

(1) D-ro Szilágyi skribas, ke unu el miaj impulsoj "esprimiĝas en . . . satiro kontraŭ Baghy". Oni volu kredi, ke en neniuj poemoj mia intence aperas atako kontraŭ "kara Julio". Verkante la poemon, kiun verŝajne aludas Szilágyi, mi eĉ ne pensis pri li. Por Julio Baghy mi sentas nur profundajn admiron kaj respekton.

(2) D-ro Szilágyi diras, ke "multaj" el niaj vortoj "ne aperas en la aldonitaj listoj kaj ankaŭ ne en la Plena Vortaro". Mi esperas, ke li aŭ alia sendos al ni kompletan liston de la mankantaj vortoj, ĉar efektive mi opinias, ke li eraras. Ekzemple, la sola vorto de li citita, nome *karapaco*, nepre troviĝas en la P.V. (3a eldono, p. 221). Ni aparte klopodis, ke neniuj vorto en la libro restu mistero antaŭ serioza leganto.

W. Auld,
Glasgow, Skotlando.

Ĉu viaj amikoj estas membroj
de U.E.A.?

Se ne, varbu ilin !

La infanoj en ĉiuj landoj lernu unu saman fremdan lingvon

Unuanimaj esplorrezultoj el Norvegujo, Nederlando, Usono kaj Kanado

Ĉiusemajne la norvegaj gazetoj publikigas la rezulton de Gallup-enketo. La 1an de novembro 1952 oni publikigis la esploron, kies plenan tekston mi ĉemetas en Esperanta traduko, supozante ke ĝi povas havi intereson por la Esperantistoj.

Estas rimarkinde, ke en Norvegujo kaj Nederlando praktike nur du lingvoj estas konsiderataj kiel solvoj de la demando pri lingvo internacia: la angla kaj Esperanto, kaj la Gallup-instituto norvega miras pro la bela pozicio de Esperanto. Tamen, el ĝia komentario oni vidas ke ĝi komprenis la ĉefan kaŭzon, pro kiu oni devas elekti neŭtralan lingvon. Oni devas atenti ke la Esperanto-movado en Norvegujo nenion sciis antaŭe pri ĉi tiu enketo, kaj sekve ne povis aparte koncentrigi nian propagandon pri informado tiucele.

C. Stop-Bowitz.

, * * *

NENIAM okazis tiom da internaciaj konferencoj kaj entute tiom vasta interŝanĝado de sperto-materialo en ĉiuj fakoj, kiom dum la jaroj postmilitaj. Ĉi tiun kreskantan internacian komunikigadon sekvas kreskanta bezono por scio pri fremdaj lingvoj, grandparte ankaŭ inter homoj, kiuj antaŭe nur malofte bezonis tiajn sciojn.

Kiel estus, se ĉiuj infanoj en ĉiuj landoj lernus unu saman fremdan lingvon? La Gallup-institutoj en Norvegujo, Nederlando, Usono kaj Kanado enketis pri ĉi tio, kaj la rezultoj estas tiom unuanimaj por tia propono, ke ĝian efektivigon oni povas karakterizi kiel realigon de dezirrevo ĉe la popoloj. Tio donus allogajn perspektivojn: kien ajn en la mondo oni vojaĝus, oni estus komprenata kaj povus sin komprenigi.

La demando farita en la kvar landoj sonis: "Estas proponite ke ĉiuj infanoj en ĉiuj landoj lernu unu fremdan lingvon. Ĉi tiu lingvo, kiu estu la sama en ĉiuj landoj, do estus komprenata ĉie. Ĉu vi trovas tion bona aŭ malbona ideo?"

Jenaj procentaĵoj en la kvar landoj trovis la ideon bona:

Norvegujo	..	..	82%
Nederlando	..	..	82%
Kanado	..	..	84%
Usono	..	..	78%

En Norvegujo la respondoj apartiĝas jene:

Bona ideo	..	..	82%
Malbona ideo	..	..	3%
Ne scias	..	..	15%

Ĉiuj tavoloj de la norvega popolo kun tre granda plimulto trovis la ideon bona. Inter oficistoj la procentaĵo estis eĉ 90. En urboj ĝi estis 80. Plej malaltan aprobprocentaĵon oni trovis inter privataj komercistoj, sed ankaŭ inter ili ĝi estis 76%.

Kiun lingvon oni elektu?

La dua demando estis jena: "Kiun lingvon oni elektu kiel internacian komunan lingvon?"

La respondon al ĉi tiu demando ne estas rekte kompareblaj en la kvar landoj, ĉar la angla ja ne estas "fremda" lingvo en Usono kaj Kanado. En Usono 27% deziris la

francan kaj 25% la hispanan. Poste sekvis germana, latina, itala, rusa, hebrea kaj pola. En Kanado plimulto (55%) deziris la francan. Sekvis la hispana (8%) kaj germana (6%). Kelkaj proponis ke la lingvon elektu UNO. Esperanto preskaŭ ne estis menciata en Usono kaj Kanado.

La respondoj el Norvegujo kaj Nederlando tamen estas rekte kompareblaj.

	Norvegujo	Nederlando
	%	%
Angla ..	67	56
Esperanto ..	21	30
Germana ..	0.5	1
Franca ..	0.5	5
Sveda ..	0.2	—
Hispana ..	0.1	—
Rusa ..	0.1	—
Ne scias ..	11	12
Sumo ..	100.4	104

La sumoj superas 100% ĉar kelkaj menciis pli ol unu lingvon. La procentaĵoj por Esperanto estas rimarkinde altaj en Norvegujo kaj en Nederlando. Tiuj, kiuj indikis ĉi tiun lingvon, kredeble pensis pri la mal-facilaĵoj por igi la grandpotencojn akcepti aliajn lingvojn ol sian propran, se ĉi tiu alia lingvo ne estus tute neŭtrala, kaj tiel ne donus avantaĝon al iu lingvo antaŭ la aliaj.

Monda kopirajto—

Norvega Gallup-Instituto A/S.

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝoj

Bonamy. Al Ges. P. Bonamy en Saint Nazaire, Francujo, la 6an de februaro 1953 naskiĝis filo, Claude.

Nesbitt. Al Bill kaj Sylvia Nesbitt (14 Hill St., Haverfordwest, Pembs., Britujo) naskiĝis filo, la 22an de marto 1953.

Gefianĉiĝo

Verkaart-van Gils. Gefianĉiĝis F-ino T. Verkaart, Klundert, kaj S. van Gils, Uithoorn, Nederlando, je la 6a de aprilo 1953.

Edziĝo

Chomette-Farnsworth. Je la 7a de marto 1953 F-ino Dianto Chomette, filino de nia delegito en Los Angeles, Usono, kun Lee Farnsworth.

Al ĉiuj ni esprimas sinceran gratulon.

Niaj mortintoj

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj, al kies parencoj ni volas esprimi nian profundan kondolencon.

Blot, S-ro Louis, el Seiches, Francujo, mortis la 17an de marto, 78-jara. Li estis fidela pioniro de Esperanto en la regiono de Angers.

Briggs, S-ro Charles H., delegito en Bell Gardens, Calif., Usono, kaj Honora Membro de UEA, forpasis la 8an de aprilo 1953, 74-jara.

Briquet, D-ro Maurice, el Lille, Francujo, mortis la 18an de februaro 1953, 88-jara. Li aperigis la fakan gazeton *Internacia Medicina Revuo* en la jaroj 1926-28 kaj sukcesis altiri al ĝi multajn kunlaborantojn. Mi poste daŭrigis lian taskon sed diversaj cirkonstancoj devigis min ĉesigi la eldonon. D-ro Briquet estis la aŭtoro de rimarkinda teknika medicina vortaro, kiu, kvankam eldonita antaŭ dudek jaroj, konservas sian tutan valoron por ĉiuj, kiuj okupiĝas pri medicina arto.


P. Kempeneers.

Hoogervorst, S-ro Hendricus Antonius, delegito en Aalsmeer, Nederlando, forpasis la 21an de aprilo 1953, 65-jara.

Monod, F-ino Helène, Morges, Svislando, mortis en aprilo 1953. Ŝi estis fondintino de la tiea grupo kaj ĉiam bona subtenanto de UEA.

Riis, S-ro Herluf, Fredericia, Danlando, mortis la 24an de marto 1953, nur 43-jara. Li estis antaŭa vicprezidanto de la Fredericia Esperanto-Klubo.

Sebastian, Pastro (Fitzpatrick), O.F.M., mortis la 8an de aprilo 1953 en Dublin, Irlando. Li estis antaŭe FD de UEA.



Tra la Libraro

Duope ricevitaĵn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevas nur mencion.

*=akireblaj ĉe U.E.A.

*La recenzinto estas libera en sia prijuĝo de verkaĵo.
Lia opinio ne ligas la Asocion aŭ la Estraron de U.E.A.*

***W. Shakespeare — Trojlo kaj Kresida**, tragedio-komedio en kvin aktoj, traduko de Stephen A. Andrew. Eldonita de The Esperanto Publishing Company Ltd., Rickmansworth, Anglujo. 18 × 12 cm., 96 paĝoj, broŝ. Prezo 2ŝ. 6p., afr. 2p.

Longa vojo kondukis al ni, kaj al Esperanto, la gracie intermikson de ĝojo-doloro, de amo-perfido, de naivociniko kiun ludas la paro el Trojlo kaj Kresida. De la cikla poemo pragreka *Cipraj* al *Iliado* (en ĝi, cetere, nur aludeto), al aliaj grek-antikvaj redaktaĵoj, la gaje malgaja historieto venas en verkon de Sofokles (*Trojlo*), en plena gloro de greka literaturo ; kaj de tie ĝis la antikva franca (*Le roman de Troye*, de B. de Sainte-More), kaj ĝis la XIV-jarcenta itala literaturo (Boccaccio, *Filostrato*). De Boccaccio al Chaucer, de Chaucer al Shakespeare ; kaj al multlingvaj tradukoj aldoniĝas nun tiu en la nian.

Trojlo, juna troja princo, amas Kresidan, filinon de Kalĥaso ; ŝia onklo, senskrupula parigisto, kondukas ŝin al la amo senpacienca de Trojlo. Ambaŭ estus feliĉaj, sed interŝanĝo de militkaptitoj devigas ŝin reveni al ŝia patro en la greka armeo. La duopo disiĝas kun kortuŝa peno. Sed Kresida ne restos fidela, kaj, post reveno al la siaj, ekamas Diomedon, grekan heroon. Trojlo ekscias tion Ĉu vi atendas memmortigon ? Ne, la historio diras nur, ke li rekomencas batali ; kaj

pli-malpli cinika, maldeca moralo (pri kies aŭtoro oni dubas) fermas la komedion fare de la onklo-parigisto.

S-ro Andrew tradukas per lerta stilo, kies periodoj sonoras, ritmas kaj ordiĝas laŭ la XVII-jarcenta modelo. Plie, li plenumas promeson de la antaŭparolo, kaj evitas al la leganto preskaŭ ĉian cerbumadon pri la malklaraĵoj de la originalo. Sed li invitas la leganton utiligi notojn de traduko en sian nacian lingvon. Kial do ? Mi komprenas, ke notado kaj komentario al klasika verko postulas penon kaj plian respondecon ; sed mi elektas Esperantan tradukon ĉar en *tia* mi volas koni Shakespeare, trovante ĝin pli taŭga ol la mialingva por kapti ĉiujn nuancojn ; kaj ne por havi en mia libroŝranko kuriozaĵon por propagandi Esperanton ! Do mi devas trovi en libro kiun mi aĉetas plenkonvinke pri boneco kaj de la traduko kaj de la lingvo kaj de la eldono, ĉion kiu utilos al mia legado. Manko en tiu senco indikas dubon pri taŭgeco de Esperanto por diskonigo de klasikaj verkoj : kio, evidente, ne estas la sinteno de S-ro Andrew. Kaj tiam ?

C.C.

Sennacieca Revuo, nova serio, n-ro 81, 22.5 × 17.5 cm., 60-paĝa, eldonita kaj redaktita ĉe S.A.T., 67 Avenue Gambetta, Paris 20. Prezo : 200 fr. fr.

Escepte ni citas tiun ĉi eldonaĵon inter libroj, kvankam ĝi estas

periodaĵo. La amplekso tion rajtigas. La nuna kajero enhavas la tekston de la prelego de Profesoro Waringhien "la ideologia dramo de L. L. Zamenhof," kaj jam pro tio meritas atenton; krome dekduon da aliaj artikoloj, konformaj al la intenco de la redaktoroj nome, "nenion banalan, trivialan aŭ vulgaran". Atentinda estas artikolo "Por ke okcidentanoj komprenu foran orienton", kaj por ke la humoro ne manku troviĝas rid-eksploziga priskribo de Raymond Schwartz pri "l' akcepto de la sufikso -end per la Esperanto-Akademio". Plion ni ne diras, akiru la numeron kaj vi certe . . . ne pentos tion.

H.J.

D-ro Arthur Baur : "Das Problem der internationalen Sprache (La problemo de l' internacia lingvo) 20-paĝa, 22 × 15 cm. Eldonis: Buchverlag der Verbandsdruckerei, Bern. Prezo : 2 respondkuponoj.

Bonega maniero informi publikon pri nia celado, estas aperigi seriozan tekston (ne reklamon!) en difinitaj verkoj, leksikonoj, adresaroj, informaroj. Tia estas ekzemple la "Jahrbuch der Eidgenössischen Räte", la Jarlibro de la svisaj federalaj aŭtoritatoj (konsilantaroj). Tiu ĉi dika verko estas tre disvastigita kaj ni devas danki D-ron Baur, ke li sukcesis enigi tre bone dokumentitan de li verkitan artikolon pri la problemo kiu por ni Esperantistoj ne plu estas tia. Nebezzone diri ke la teksto estas laŭfakta, senripoĉa. La verkinto estas jam bone konata al ni: Radio-parolisto de la Svisa kurtonda Radio-stacio kaj redaktinto de la "Svisa Antologio". La represo sub bonaspekta kovrilo estas tre taŭga informilo por germanlingvanoj.

H.J.

Esperanto. Junulkurso, ilustrita. 24 × 16.5 cm., 80-paĝa. Eldonis: S.A.T. Amikaro, 67 Avenue Gambetta, Paris 20. Prezo : 1 Usona dolaro.

Jen bonega kursa lernolibro por junuloj. Dudek lecionoj, ĉiuj ilustritaj per desegnaĵoj, ĉiu gramatikero klare elmontrita en Esperanto, sed je la fino franclingva resumo de la lernitaĵo. Ĉiu leciono estas antaŭata de "Konsilo al kursgvidantoj". La instruo havas kiel kernon, rakonton titolitan "Aventuroj de Johanino kaj Karlo", kio certe pligrandigas kaj konservas la intereson por la lernobjekto Esperanto. La bonan enhavon paralelas bela neta preso (mankas indiko pri presisto!) kaj praktika aranĝo por elpreni tiun aŭ alian lecionon. Entute uzinda kaj akirinda novaĵo.

H.J.

***International Language for Scouts.** George Rust. Eld. S.E.L., Wilbury Crest, Letchworth, Herts. 18.5 × 12 cm., 74 paĝoj, broŝ. Prezo 1ŝ. 6p.

La skolta movado jam tre simpatias al Esperanto—ĝia fondinto Lordo Baden-Powell mem ofte favore menciis ĝin. Konvena, do estas la apero de ĉi tiu lernolibro, kiu por anglalingvaj skoltoj prezentas la Internacian Lingvon tute alloge. Ĉion oni instruas el la vidpunkto de la mondo skolta, kaj sendube, pro la cirkonstancoj, tio estas prudenta metodo. Tiu fakto tamen alportis evidentajn neordinaraĵojn rilate al la prezentiĝo de la gramatiko, kaj oni sentas bedaŭron pro tio ke la aŭtoro ŝajne ne serĉis kunlaboron kun alia kompetenta gramatikisto.

Malgraŭ tio, la celo de la libro estas bonega, kaj konvene utiligita, oni povos per ĝi atingi tre bonajn sukcesojn en la skolta medio.

Strigo.

Wörterbuch Esperanto-Deutsch, de Butin kaj Sommer. Eld. Limburger Vereinsdruckerei, Limburg/Lahn, Germanujo. 17 × 12.5 cm. 244 paĝoj, bind. Prezo gm. 9.00.

Por ĉiu aktiva esperantisto vortaro estas ĉiutaga necesajo. Per la apero de la vortaro de Butin kaj Sommer estas kontentigata postulo de niaj germanaj samideanoj forigi mankon sentitan dum la postmilitaj jaroj. La vortaro estas bonformata, entenanta vortabundon eĉ el multaj specialfakoj, kiu estas trovebla nur en grandaj enciklopedioj. Multajn esprimojn oni devus serĉi en diversaj fakvortaroj ofte nacilingve klarigataj. La amplekso de la vortaro atingas preskaŭ "Wüster", sed kun multloke pli detalaj klarigoj de la germanlingvaj ekvivalentoj. La aŭtoroj, por ne timigi la komencantojn, atentigas la uzontojn pri la problemo de multaj neoficialaj vortoj, duoblaj formoj kaj sinonimoj, lasante la finan decidon pri ilia uzindeco al la Akademio kaj la esperantistaro. Bedaŭrinde estas, certe pro ekonomiaj kaŭzoj, ke la komposta aranĝo ne estas simila al "Christaller" aŭ "Wüster". Tamen oni povas nur gratuli kaj danki al la aŭtoroj por la granda tasko bone elfarita.

B.R.Z.

Lago de Como, kolora faldprospekto arte ilustrita kun aldona 12-paĝa mallonga gvidlibro pri la restadstacioj kaj pri la ĉefaj turismaj lokoj de la Lago de Como. Eldonita de Ente Provincial per il Turismo, Piazza Cacciatori delle Alpi, Como, Italujo, de kie estas ricevebla ĉi tiu bela presaĵo. La Itala Esperanto-Kongreso okazos en septembro en ĉi tiu vidinda urbo.

Post la kurso, verkita de Wilhelm kaj Hans Wingen. Eld. Limburger Vereinsdruckerei, Limburg/Lahn, Germanujo. 21 × 15 cm. 100 paĝoj, broŝ. Prezo 3.60 gm. plus .40 afranko.

Jen ! Libro por esperantistaj rondoj, kluboj k.t.p. (krom izoluloj), kiun ĉiu estro elkore bonvenigos.

Post la kurso estas majstre aranĝita libro por fari klubvesperojn interesaj kaj reteni la lojalecon de novaj anoj de la movado. Oni povus envii niajn germanajn samideanojn kaj samtempe gratuli ilin pri tiu nova aldono al la instruilaro de Esperanto.

La aŭtoroj donis specialan atenton al germanismoj, al vortfarado kaj al frazaro de la ĉiutaga vivo. Mallongaj legaĵoj kaj anekdotoj, ilustritaj per skizaj bildetoj pliriĉigas la tre uzeblan verkon. Laŭ divido de la materialo, la libro ebligas doni amuzan pliperfekton sen laciĝo dum ĉiuj semajnaj klubkunvenoj de tuta jaro. La apero de similaj libroj aliloke en Esperantujo estus certe salutinda, ĉar ni bezonas multe pli multe da "parolantaj" samideanoj. B.R.Z.

Gramática de Esperanto de Ismael Gomes Braga. Eldonita de Cooperativa Cultural dos Esperantistas, Ltda., Rio de Janeiro, Brazilo. 200 p., 18 × 13 cm., bind. kru. 50 aŭ esk. 60 ; broŝ. kru. 35 aŭ esk. 45.

Nova verko de nia senlaca veterano Ismael Gomes Braga. Utila enhavo kun Zamenhofaj ekzercoj kaj proverboj. Mensa gimnastiko ! Popola materialo por popularigi la popolan Esperanton ! Rimarkigoj kaj notoj, kiuj tuj fingremontras la spertulon kaj malavare servas lernantojn kaj instruistojn. Ĝiaj 42 temoj kun la respektivaj temŝlosiloj duobligas la valoron de la libro.

Saldanha Carreira.

J. P. van Dijk :

La inunda katastrofo

LA 31an de Januaro je la 13a horo la antaŭdiroj per la radio pri la vetero estis malfavoraj: “Ni avertas pri ventego el la nord-okcidento kaj atendas altan alfluron sude de Rotterdam.”

Posttagmeze la vetero estis ankoraŭ sufiĉe bona; blovegis, sed nenio igis pensi ke en la sekvontaj horoj tiom da mizero estos verŝata super parton de Nederlando.

Tamen en la vespero la forto de la vento kreskis ĝis ventego; ni do ne eliris por kartludi kun najbara bofrato kaj lia edzino, sed kiel kutime ni enlitiĝis je la 22.30.

Dimanĉon matene, proksimume je la sepa kaj duono, la telefono elvokis min el la lito. Estis nia filino, loĝanta sur farmbieno je distanco de 4 km. de nia loĝejo en la vilaĝo Ouwerkerk; ŝi demandis min, ĉu ni jam aŭdis ion pri la okazintaĵoj de la pasinta nokto.


Je mia respondo “Ne!”, ŝi informis min, ke pro la altega alfluo en la nokto

la digoj de la poldero en kiu ili loĝas trarompigis; la akvo nun ĉirkaŭas ilian domon. Jam frue en la mateno ili estis klopodintaj atingi nin, tamen la akvonivelo estis jam tro alta. Post kelkaj vortoj miaflanke la telefonkontakto estis rompita.

Levinte la fenestro-ŝirmilojn, mi vidis, ke ankaŭ en nia poldero—Oosterland—la akvo jam enpenetris; fekundaj terkampoj estis inundataj, la akvo jam kovris la ĉefvojon. Ĉar mia domo situas iom pli alte, tuja danĝero ne minacis. Intertempe la elektra fluo haltis—aŭskulti la radio-komunikojn ni ne povis plu.

Kun mia edzino ni komencis alporti diversajn aĵojn al la subtegmentejo, i.a. provizon da akvo kaj vivrimedojn por la tempo, dum kiu ni estos devigataj resti supre.

Posttagmeze je la 2a la akvo fluis trans la sojlon kaj ni devis iri supren al la subtegmentejo. La akvo rapide altiĝis kaj altiĝis, dume la ventego



La domo de S-ro van Dijk antaŭ la inundo

fortiĝis ; altaj ondoj estiĝis, kiuj atakis pli kaj pli la diversajn el la akvo elstarantajn objektojn.

Tra la subtegmentaj fenestroj ni povis vidi sufiĉe grandan ĉirkaŭaĵon : ĝis malproksime ĉiuj terkampoj estis kovritaj per akvo, el kiu la domoj elstaris kiel malgrandaj insuletoj. La najbaraj domoj estis atakataj de la altegaj ondoj.

Ankaŭ nia loĝejo iom post iom akiris damaĝon. Je la 4a posttagmeze la ondoj detruis nian gardejon, kiu staris norde tuj apud nia domo. Poste la domo mem estis atakata—alkonstruaĵo detruigis, fenestroj rompiĝis kaj tiam la ondoj povis libere penetri en la internon de la domo. Internaj muroj detruigis kaj pro tio la ŝtuparo rompiĝis. Sekve ni estis kaptitaj sur la subtegmentejo, dum sube la akvo atingis nivelon de proksimume du kaj duono da metroj super la planko. Kvankam la vespero kaj la nokto estis timigaj la eksteraj muroj eltenis kaj ni povis resti supre sendanĝere.

Lundon matene la ventego iomete mildiĝis, kaj la nivelo de la akvo estis pli malalta. La najbaraj domoj montris gravajn difektojn ; ses apudaj domoj tute malaperis dum la nokto. Kio estis la sorto de la enloĝantoj ? Cetere, ni povis nun vidi nenion de la farmbieno de la filino ; tiu tute detruigis kaj ni havis maltrankvilon pri ilia sorto.

Lundon posttagmeze nia bofrato kaj lia edzino, kiuj loĝis en najbara domo, pro kritika stato de sia loĝejo venis al ni, kurante ĝis la talio en la akvo. Kiam ili atingis nian domon, ili konstatis ke la ŝtuparo detruigis kaj ke ili ne povas atingi nin. Tamen kune kun mia edzino ni nodligis litkovrilojn unu al la alia kaj per tiuj ni povis tiri ilin al la subtegmentejo.

Ni provizis ilin je sekaj vestoj, donis al ili varman trinkaĵon kaj igis ilin iri en la liton.

En la nokto la vento mildiĝis pli, kaj ni povis iomete dormi. Mardon la akvonivelo ree estis iom pli malalta, fakte ne blovis plu. Por ni la danĝero preterpasis.

Posttagmeze per helikoptero oni komencis evakui la enloĝantojn de la vilaĝo ; tio donis iom da distraĵo al ni, kiuj loĝis kvaronhoron ekster la centro.

Vespere ni dividis nian lastan panon.

Trankvila nokto sekvis. Merkredon matene, proksimume je la 9a, du boatetoj, en ĉiu du viroj, venis al nia domo. Ili alvokis nin, dirante, ke ni devas pretigi nin por evakuiĝo—la tuta vilaĝo devas esti senhoma jam tiun vesperon.

Ni vestis nin per bonaj vestoj, enpakis kofrojn kaj post kvarono de horo estis pretaj. La viroj—fiŝkaptistoj el Scheveningen—helpis nin malsupreniri de la subtegmentejo. Sube ni povis ĵeti regardon al la grava damaĝo, interne kaj ekstere kaŭzita al nia loĝejo. Ne estis tempo por mediti pri tio ; la viroj prenis nin sur la dorsojn kaj portis nin tra la akvo al la boatetoj. Poste ili remis al la ĉefvojo, kie troviĝis usona amfibia veturilo. Oni kondukis nin al haveno je la plej orienta parto de nia insulo Schouwen-Duiveland, al pasaĝersipo. Dumvojaĝe ni povis ĉie vidi la multajn detruaĵojn, kaŭzitajn de la ondegoj.

Je la dekunua la boato, ŝargita de 210 enloĝantoj de nia vilaĝo, ŝipiris al Dordrecht. De la kunvojaĝantoj ni aŭdis pri la mizeraĵ okazintaĵoj, kiujn ili travivis ; pri la multaj perdoj, kiujn ili havis.

En Dordrecht ni forlasis la ŝipon. Aŭtobusoj staris pretaj por alporti nin al Amersfoort, urbo en la mezo de la lando. En tiu urbo ni estis kore bonvenigataj; kuracisto faris mal-longan ekzamenon, ni estis enskribitaj kiel portempaj enloĝantoj de tiu urbo kaj oni donis al ni evaku-adreson, kien alportis nin aŭtomobiloj. Post okupita tago ni trovis koran akcepton ĉe afabla familio—kun danko ni memoras la agrablan restadon tie.

En Amersfoort ni akiris la unuajn informojn pri la katastrofo, kiu okazis; ni ne estis povintaj konjekti ke la unua de Februaro kaŭzis tiom da mizero en la sudokcidenta parto de nia lando. Nia insulo preskaŭ tute subakviĝis; evidentiĝas pli kaj pli ke ĝi estas la plej multe trafita insulo el ĉiuj.

Estis malfrue en la vespero de ĵaŭdo, kiam ni ricevis informon, ke nia filino kun edzo kaj la du infanetoj ankoraŭ vivas. Apenaŭ ili savis la vivon; ĉion ili devis postlasi. Kelkajn tagojn poste ni ricevis de ili ampleksan leteron, en kiu ili rakontis siajn travivaĵojn.

Post la telefona konversacio kun ni je tiu dimanĉmateno, ili, kiel ni, komencis transporti meblaron k.t.p. al la subtegmentejo, kaj kiam la akvo enpenetris la domon, ili sin savis tie. Tamen baldaŭ ili rimarkis, ke parto de la muroj disfalis. Iom post iom ankaŭ aliaj muropartoj detruigis, kaj posttagmeze la tuta farmodomo, grenejo, k.t.p. estis ruino. Ili povis kapti lignan muron de inter du subtegmentaj dormoĉambroj, kaj sur tiu malgranda floso ili povis forlasi la domon. Kvankam pro la altegaj ondoj la veturo estis danĝera, post horo kaj duono ili atingis el la akvo starantan sekan digoparton; aliaj albordiĝintoj helpis ilin forlasi la flosan.

Jam krepuskiĝis: kun vestaro malseka ili devis restadi tie dum proksimume 24 horoj, ŝirmitaj nur de kelkaj pajlaj pakoj.

London posttagmeze kun helpo de aliuloj ili povis atingi dometon je distanco de kelkcent metroj: tie ili trovis ree tegmenton super la kapo. Antaŭe tamen je la flanko de la digo oni enterigis senceremonie dek kvar dronintajn personojn.

Entute nun 80 personoj, ĉiuj albordiĝintaj el la vilaĝoj Nieuwerkerk kaj Ouwerkerk, troviĝis tie. La aventuroj, kiujn ili rakontis, estis nur pri grandega mizero.

Mardon tagmeze helikoptero alportis panon al la malfeliĉuloj; poste venis malgrandaj hidroplanoj, kiuj alportis trinkakvon, kaj per kiuj malsanaj kaj vunditaj homoj povis esti transportataj al malsanulejo.

Posttagmeze venis fiŝistboato el Tereseke tra digo-truo; kun malgrandaj motorboatoj ili venis al la digoparto, kie troviĝis la grupo da personoj. Ĉiuj povis esti transportataj al ŝipo kaj tiu, ŝargita, veturis al la haveno de Terseke. Per aŭtobusoj oni transportis ilin poste al tendaro en la vilaĝo Souburg apud Vlissingen.

Post kelkaj travivaĵoj tie ili akiris portempan restadejon en la loĝejo de la urbestro de Vlissingen, kie ankoraŭ nun ili estas. Intertempe la familio retrovis sian ekvilibron, kaj kvankam materie ili perdis ĉion, ili estas dankemaj, havante la vivon.

Pli ol 100.000 personojn oni evakuis al aliaj provincoj. Daŭros monatoj antaŭ ol la plej granda parto el ili povos reiri al siaj domoj, se almenaŭ tiuj domoj ankoraŭ tiutempe ekzistos. Ĉar proksimume 4.000 loĝejoj tute detruigis, 4.000 loĝejoj grave kaj 20.000 malpli grave difektiĝis, dum ankoraŭ nun ĉiutage domoj disfalas.

La Rondo Familia

KIAM membro de nia familio renkontas malfacilaĵojn, aŭ kiam grava malfeliĉo trafis lin, ni tuj estas pretaj helpi lin. Ni streĉas ĉiujn niajn fortojn por mildigi la damaĝon. Membro de nia tutmonda familio estas nun en tiu situacio. Per kelkaj vortoj mi volas klopodi skizi la mizeron en kiu li troviĝas.

Samideano Maas en Vlissingen loĝis dum la milito en Westkapelle, vilaĝo en la provinco Zeeland, apud Vlissingen. Dum la unuaj tagoj de la milito 1940–1945, kiam en Zeeland la milito furiozis, li perdis por la unua fojo ĉion. La 3an de oktobro 1944 la

duan fojon li perdis ĉiujn havaĵojn pro la bombardo, kiun la militestroj opiniis necesa por liberigi Eŭropon. Apenaŭ li kaj lia familio povis savi sin. Kun granda peno li denove komencis reakiri la perditaĵojn. Ĉar li estas artpentristo kaj desegnisto li multon devis fari por restarigi sian laborejon. Financa helpo de la registaro estis malmulta ĉar ne estis sufiĉe da mono por helpi al ĉiuj laŭbezone. Finfine li sentis sin feliĉa denove povi labori. Sed venis la granda katastrofo de la 1a de februaro pasinta.

Vlissingen ankaŭ parte subakviĝis



kaj ĝuste en tiu parto li havis sian laborejon. Ĝi tute subakviĝis; la akvo atingis altecon de 1.20 m., kaj multaj pentraĵoj, desegnaĵoj, valoraj libroj pri arthistorio perdiĝis. Krome li perdis altvaloran preson por fari akvaŭfortojn (kosto pli ol f. 2000,—). Mallonge dirite, li perdis ĉion kion li havis por vivteni sin kaj sian familion.

Feliĉe li povis savi desegnaĵon kies reproduktaĵon vi vidas en tiu ĉi numero de *Esperanto*. Ĝi montras la rifuĝon de la loĝantaro el Westkapelle post la bombardo de la mardigo dum la milito. La produktaĵo estas malgrandigita bildo de la desegnaĵo. Per tiu ĉi desegnaĵo li nun volas klopodi denove akiri vivrimedojn kaj li petas la helpon de nia tutmonda samideanaro.

Li intencas presigi reproduktaĵojn (formato 18 × 24 cm.) de la originalo kaj vendi ilin al vi, gesamideanoj. La prezo estas fl. 1,— (minimume) por ekzemplero. Bone komprenu, li ne volas almoŝpeti; rekompence de nia helpo li donas ion. La bildo montras la tipan Zeelandan kostumon kiun la kamparanoj ankoraŭ nun portas.

Gesamideanoj, jen okazo por montri nian samideanecon, samfamilianecon. Kiam ĉiu Esperantisto aĉetos minimume unu ekzempleron, por la tre malalta prezo, li akiros sumon kiu ebligas al li denove komenci. Geamikoj, mi scias, ke eksterlandanoj multegon faris por helpi la mizerulojn de la fatala nokto de 31 januaro-1 februaro—pro kio ne nur la viktimoj, sed la tuta nederlanda popolo, estas tre dankaj.

Membro de nia familio estas en mizero; ni kune helpu lin! La naturo forrabis ĉion, kion li havis, kion li bezonas por vivi. Ni, homoj, klopodu mildigi por li la sekvojn de la katastrofo.

Miajn kolegojn—la delegitojn—mi petas prizorgi la mendojn kaj enkasigi la monon. Vi sendu la monon al mi aŭ al UEA. Individuajn mendojn oni sendu al mi kun 5 respondkuponoj por ĉiu. Mi esperas ke el ĉiuj partoj de la mondo venos la mendoj. Vi povas esti konvinkitaj, ke S-ro Maas estos treege danko al vi.

E. de Wolf,

Delegito en Haarlem, Nederlando.

Joh. de Breukstraat 18.

Internacia Konkurso 1953

Stato je la 31a de marto

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Maroko ..	600	620	103.0
2. Aŭstralio ..	900	910	101.1
3. Germanujo ..	3200	3085	96.4
4. Urugvajo ..	250	240	96.0
5. Danlando ..	2500	2345	93.8
6. Belgujo ..	2200	1998	90.8
7. Francujo ..	5200	4666	89.7
8. Svislando ..	1450	1270	87.5
9. Italujo ..	2400	2065	86.0
10. Aŭstrujo ..	800	685	85.6
11. Sudafriko ..	300	245	81.8
12. Britujo ..	10000	8154	81.5
13. Nederlando ..	4600	3720	80.9
14. Japanujo ..	900	690	76.7
15. Finnlando ..	2200	1685	76.6
16. Kubo ..	250	185	74.4
17. Svedujo ..	5500	3985	72.5
18. Usono ..	2300	1662	72.3
19. Portugalujo ..	600	425	70.8
20. Kanado ..	300	205	68.3
21. Hispanujo ..	1500	1015	67.6
22. Islando ..	450	300	66.7
23. Norvegujo ..	2100	1390	66.2
24. Irlando ..	250	155	62.0
25. Argentino ..	500	300	60.0
26. Nov-Zelando ..	900	480	53.3
27. Jugoslavujo ..	1500	565	37.7
28. Brazilo ..	6500	30	0.5

Varbu viajn amikojn kaj tiel helpi al ili, al via landa progreso, kaj al U.E.A.

E. A. Haugen :

Satiro

KIAM oni legas *Peer Gynt* de Ibsen—eĉ nur supraĵe—oni ne povas ne vidi, ke multaj el la scenoj tuŝas fenomenojn, kiujn ĉiutage renkontas esperantistoj kaj aliaj homoj, kies vidpovo ne estas limigita de nacia memsufiĉeco.

La emo al nacia memgloro certe estas unu el tiuj malfortecoj ĉe la popolanimo, kiujn la popol-gvidantoj plej multe kaj lerte eluzis por atingi specifajn politikajn celojn. Ne povas esti ia dubo pri tio, ke tiuj krizoj, kiujn ni dum la lastaj jardekoj vidis, estas rezulto de konscia agitado kaj propagando bazitaj ĝuste sur tiuj primitivaj sentoj.

Ibsen same kiel Zamenhof rigardas tiujn primitivajn sentojn kun malŝato, sed estas granda diferenco inter iliaj motivoj. Zamenhof vivis dum sia juneco inter la konfliktoj de urbo kun loĝantoj el kvar diversaj popoloj. Tiuj konfliktoj vundis lian koron, kaj kiel gimnaziano li jam estis matura mondcivitano. Li brulis de la deziro doni al la homaro ilon por interkompreniĝo. Ibsen batalis por sia ekzisto kiel verkisto kaj sentis sin ne sufiĉe alte taksita inter siaj samlandanoj. Tuj kiam li ekhavis rimedojn, li iris eksterlanden kaj li restis en libervola ekzilo dum 27 jaroj. Lia motivo do parte estis deziro venĝe piki siajn samlandanojn. Tie en la malproksima eksterlando li rigardis Norvegujon, kiel loĝejon de nacional-romantikuloj, kiuj fosadas en sia prahistorio kaj estas fieraj pro la popol-herooj, la vikingoj, kaj pro sia pratempa lingvo. Li pli kaj pli

ŝanĝiĝas al eŭropano kaj mondcivitano.

Zamenhof parolas el varma koro al la koroj. Liaj bataliloj estas prudentaj admonoj al interpopola frateco. Ibsen vipas la konsciencojn per satiroj kaj ridindigas la primitivajn strebojn de la nacional-romantikuloj.

Precipe en *Peer Gynt* Ibsen atakas tiujn tendencojn. En la 5a sceno de la dua akto li kondukas nin al Ronden, simbolon de Norvegujo tia kia ĝin vidas Ibsen, kaj ni koniĝas kun la regno de la troloj. La kriterio de vera trolo, t.e. vera norvego, estas ke li estas memsufiĉa, do ne interesiĝas pri io ekster la montoj de Ronden. La troloj ne volas alpreni impresojn de ekstere, ili ne deziras vidi kiel oni vivas ekster ilia malvasta regiono. Ibsen atakas la aserton ke ĉio estas bona kaj preferinda, se ĝi nur estas el norvega, hejma origino. La troloj estas strabuloj, do ne vidas siajn proprajn mankojn, same kiel la norvegoj suferas de nacia miopeco kaj ŝatas nur tion, kio estas vere norvega. Dovrepato, la reĝo de la troloj, diras, kiam li invitas Peer ke li manĝu la kukon, kiu estas fabrikita de la bovino, kaj la bieron, kiun produktis la bovo: “Ne demandu, ĉu gustas dolĉa aŭ acida. Ja ĉefe gravas, ke ĉio estas hejme farita!”

En la XIII-a sceno de la kvara akto sinjoro Begriffenfeldt, la germana filozofo, estro de la frenezulejo en Kairo kaj mem ĵus freneziĝinta, eksplikas la esprimon “esti si mem” kaj li finas sian karakterizon de la anoj de la frenezulejo (la mondo?) jene:

*En barelo de l'memo ĉiu miopas,
en fermento de l'memo mergiĝas en
dignon,
per ŝtopilo de l'memo hermete ŝtopas,
kaj en puto de l'memo densigas la
lignon*

*Neniu priploras alies veojn,
neniu komprenas alies ideojn.*

Kaj en la sama sceno ni koniĝas kun la frenezulo Huhu, kiu havas la fiksan ideon ke la prakulturo (de la orangutangoj) perdiĝas pro tio, ke ilia pralingvo miksiĝis kun kulturaj lingvoj de ekstere, kaj li pensas revivigi tiun pralingvon. Eĉ se tiu satiraĵo estas direktata al la norvegaj lingvostrebantoj, ni scias, ke revivigo de propraj pralingvoj estas ne malofta fenomeno de nia propra tempo. Mi ne opinias, ke tia agado ĉiam meritas la karakterizon de Ibsen. Tre ofte revivigo de forgesitaj lingvoj donas al ni poeziajn gemojn, kaj ĝi povas iafoje servi praktikajn bezonojn. Sed ĉiam ekzistas la danĝero, ke ĝi nutras nacian memsufiĉecon.

Ni ankaŭ koniĝas kun alia ano de la frenezulejo, la Felaho, kiu kredas, ke li estas la reĝo Apis. En moderna lingvouzo oni povas diri, ke li suferas de la komplekso ke neniu rekonas lian grandecon. Ankaŭ ne tiu tendenco, kredi sin mem supera al aliaj pro sia origino, pro grandaj faroj, kiujn iam faris la prapatroj, ne estas fremda al nia tempo. Oni povas nur mencii kelkajn naciajn himnojn kaj tezojn de la lastaj jardekoj por konstati tion. Estas ĝusta ago honori siajn praulojn, sed se homoj pro tiuj heroaĵoj de siaj prapatroj paradas cent kaj mil jarojn poste kaj sentas sin superaj al aliaj popoloj, tiam estas vera danĝero por ŝovinismo kaj netoleremo. Plej ridinde kaj tragike estas, se la grandaj heroaĵoj estas militaj konkeroj. Ĉar ja ĉiam oni

konas la historion de sia propra popolo kaj ties heroojn pli bone ol oni konas la historion de aliaj popoloj, la propraj popolherooj ordinare estas plej gloraj.

La satiroj en *Peer Gynt* estas grandparte direktitaj al la norvegoj, sed tio ne signifas, ke la malfortecoj estas aparte norvegaj. Ili certe validas pli aŭ malpli por ĉiu popolo. Tiu propreco de la verko, flanke de la grandioza priskribo de homeco, donis al ĝi la universalan karakteron.

Kiel ni vidas, la fama verko de Ibsen havas akran pikilon kontraŭ la nacia memsufiĉeco, unu el la plej grandaj problemoj de nia mondo. Ni esperantistoj ĉiutage—konscie aŭ nekonscie—skermas kontraŭ tiu primitiveco. Mi ne dubas, ke oni povas forsarki la herbaĉon per rektaj kaj intimaj rilatoj inter la unuopaj homoj trans la limoj, kaj tiaj rilatoj estas eblaj nur per internacia neŭtrala lingvo.

Sed ĉu ni sufiĉe utiligas la batalilojn de Ibsen, la satiron? Jen granda tasko por niaj dramverkistoj. Mi diras dramverkistoj ĉar per tiu literatura formo oni hodiaŭ povas plej rapide atingi plej multe da homoj. La radioteatro fariĝis populara ero de la elsendoj. La temoj estas abundaj. Oni povas trovi ilin ĉiutage en la ĵurnalo, ekz.: Popola interfratigo per sporto, Oficialigo de pli kaj pli naciaj lingvoj en U.N. k.t.p. La teatraĵoj devas havi tiujn artajn kvalitojn, kiujn postulas la grandaj radio-stacioj kaj devas toleri tradukon kaj konkuron kun verkoj de naci-lingvaj verkistoj. Altvaloraj verkoj certe ne estus rifuzataj. Ili ne havu formon de rekta propagando por nia afero. Ilia tasko estu plugi la kampon, kiun poste prisemos la esperantistaj propagandistoj.

La glavo de la tombloĝanto

Tiu ĉi poemo havas la nomon *Hervararkvida* islandlingve, ĉar la heroino de la poemo nomiĝas Hervör. La poemo temas pri ŝia klopodo havigi al si la faman glavon de la patro. Tiu glavo estis forĝita de *dverggar* (lertaj etuloj supernaturaj), kiuj sorĉis al ĝi trioblan malbenon: ke ĝi alportu morton al sia havanto; ke ĉiuj vundoj per ĝi faritaj estu mortigaj; kaj ke tri fiaj agoj estu per ĝi faritaj. Ĝia unua havanto, Sváfrlami, estis mortigita de Arngrímr, kiu prenis la glavon. Li postlasis ĝin al sia filo, Angantyr, kiu kun siaj dekunu fratoj vivis vikingan (marrabistan) vivon. Ili estis ĉiuj mortigitaj sur la insulo de Sámsey de Hjálmar la Kuraĝa kaj Oddr, grandaj herooj, sed Hjálmar mortis pro la mortigaj vundoj fare de la glavo. Angantyr havis filinon, Hervör, ankoraŭ ne naskita je lia morto. Ŝi estis edukita kiel simpla knabino nescianta pri sia deveno. Eksciinte la veron, vekiĝis en ŝi la malnova batalspirito de ŝia gento, kaj ŝi iris armita al la soleca insulo de Sámsey por postuli la glavon de sia patro fantoma en tombaltaĵo. Malgraŭ ĉiuj teruraĵoj ŝi ne ŝanceliĝas, kaj havigas al si la glavon. La poemo priskribas tiun bravan entreprenon de Hervör, la virgulino.

La poemo apartenas al la famaj *Edda* poemoj, kiuj estis verkataj de nekonataj poetoj en la tempo inter 800 kaj 1100.

La glavo de la tombloĝanto

(Ŝaf. = ŝafisto; Virg. = virgulino;
Tomb. = tombulo)

Sur la insul' je temp' de sunkuŝiĝo
ŝafisto trovis junan virgulinon.

Ŝaf. Ho, kiu venas sola al insulo?
Ekiru, al ripoz' instigas nokto.

Virg. Ne serĉas mi ripozon pro mallumo,
ĉar mi neniun konas insulanon.
Sed diru al mi tuj rapidparole,
en kiu lok' troviĝas tombaltaĵoj.

Ŝaf. Ne min demandu; estas vi nesaga,
se volas iri vi al tiu loko.
Forkuru ni laŭ povo de piedoj;
ĉi tie resti estas tre danĝere.

Virg. Mi donos al vi ringon, se vi gvidos
min tien, ĉar nenio min timigas.
Nenio kara, kosta nek valora
aliron mian povas eĉ malhelpi.

Ŝaf. Malsaga al mi vere ŝajnas tiu
iranta sola tie ĉi dum nokto.
Ĉar flamoj flagras, tomboj oscedegas,
la tero brulas; ni rapidforkuru.

Virg. Ne timu ni pro tia fajr' flagranta,
insulo tute brula ne teruras.
Fantomoj palaj nin ne ekstremigu.
De ili eĉ postulos mi parolon.

Ŝafisto tiam fuĝis per rapido
arbaren, for de tiuj ŝiaj vortoj.
Sed forta koro de la bravulino
ŝveliĝis pro kuraĝo al agado.

*Ŝi ekvidas la tombajn flamojn kaj iras al la
tombaltaĵoj sentime trapasante la fajron
kvazaŭ fumon, ĝis ŝi atingas la tombaltaĵon de
la vikingoj. Tiam ŝi diras:*

Vekiĝu, patro, via solfilino
vin vokas kaj vin petas eltombiĝi.
Aldonu al mi glavon la plej akran
faritan de la lertaj malgranduloj.
Vikingoj bravaj, aŭdu miajn vortojn,
eliru ĉiuj de sub arbradikoj
kun kaskoj, akraj glavoj kaj kirasoj,
kun ŝildoj kaj armiloj sangumitaj.

(nenia respondo)

Jam certe estas tero vi, bravuloj,
foriĝis jam spirito terurega ;
alklinis sin al aerpeza polvo
se vi ne povas nun al mi respondi.
Vikingoj bravaj, aŭdu miajn vortojn.
Dolor' eternemorda vin turmentu,
simila al putrad' en formikejo,
se vi al mi ne donos akran glavon.
Konservi ĝin ne ĵindas al fantomoj.

Tomb. Filino mia, kial vi nin vokas
per tiaj malbenaĵoj, ja freneza
jam estas vi irante tiun vojon.
Forflugis de vi saĝo kaj prudento
vokante mortajn homojn el la polvo.
Ne metis min en tombon mia patro
nek filoj, sed kruelaj malamikoj.
El ili du postvivis, kaj la glavon
ekhavis ambaŭ, fine nur alia.

Virg. La veron al mi diru ! Ĉar mi fidas
ke forta di' al vi ripozon dolĉan
ne donos, se vi glavon al vi tenos
ne ĝin lasante : ŝajnas malfacile
por vi heredan rajton al mi doni.

Tomb. Inferpordego faŭkas, tomb' oscedas.
Vi vidas, ke insulo tute brulas.
Terure estas ĉion ĉi rigardi ;
al ŝipoj viaj tuj vin rapidigu.

Virg. Per flamoj brulaĉantaj dum la nokto
teruri min vi tute ne kapablas.
Ne tremas mia menso, kvankam vidas
fantomon mi ĉe tombofaŭko stari.

Tomb. Filino kara, mi al vi nun diros
pri tio, kion kovras estonteco.
Ja tiu glavo, tion nepre kredu
detruos certe tutan vian genton.
Vi naskos filon, kiu poste portos
malbenan glavon ; li je forto kredos.
Famiĝos lia nomo inter homoj
plej granda li fariĝos sub ĉielo.

Virg. Vi ĉiuj kuŝu, filoj de la morto,
putrantaj en la tomboj kun fantomoj.
Ho, patro, donu al mi vian glavon.
Ne decas, ke vi kaŝu ĝin pli longe.

Tomb. Ne samas vi al homoj, junulino,
ĉar vagas vi dum noktoj inter tomboj,
kun longa lanco, kasko kaj kiraso
Vi riskas stari antaŭ tombopordo.

Virg. Min homa kredis ĉiuj ĝis mi venis
ĉi tien al la terloĝejo via.
Al mi la glavon el la tombo donu,
al fortaj homoj ĝi la morton portas.

Tomb. Sub miaj ŝultroj kuŝas mortigilo.
Fantoma fajro ĉirkaŭ ĝi volviĝas.
Neniun inon konas mi en mondo
sufiĉe bravan por la klingon teni.

Virg. La akreklingan glavon mi per mano
fortege tenus, se mi ĝin nun havus.
Ne havas mi pro fajro ian timon—
la flamoj sin retiras je la vido.

Tomb. Malsaĝa estus vi, filino mia
se vin en flamon senhezite ĵetus.
Prefere mi la glavon al vi donos.
Rifuzi mi ne povas, junulino.
(*Donas al ŝi la glavon*)

Virg. Ja estas via faro bona, patro,
al mi el tombo vian glavon doni.
Mi estas pli feliĉa, bravegulo,
ĝin havi ol la tutan Norvegujon.

Tomb. Ne scias vi signifon de la vortoj.
Fatalaj ili estas, jen la vero :
Ja tiu glavo, tion nepre kredu,
detruos certe tutan vian genton.

Virg. Al ŝipoj miaj nun mi devas iri,
ĉar estas mia koro nun facila.
Ne interesas min la estonteco,
malpacoj kaj konfliktoj de la filoj.

Tomb. Dum longa temp' konservu vi la
glavon,
sed el la ingo tiru ĝin neniam.
Ne tuŝu ĝiajn randojn venenitajn.
Ĉi tiu glavo estas al la homo
mortiga kaj danĝera pli ol plago.
Adiaŭ, karfilino, tuj ni donus
la vivon de la dekdu ĉi-kuŝantoj,
la forton kaj animon forpasintajn
al vi, se estus tio iel eble.

Virg. En tombaltaĵ' vi ĉiuj restu sanaj :
mi volas for de tie ĉi rapidi.

(*al si mem, forirante dum la flamoj iom post
iom malaperas kaj mallumo denove regas*) :

Mi vivis certe inter Viv' kaj Morto
dum ĉirkaŭ mi brulaĉis fajr' fantoma.

Elislandigis Baldur Ragnarsson.


La Islanda radio lastatempe dis-
aŭdigis kiel felietonon tradukon en la
islanda lingvo de la originala Esper-
anta verko *La Alaska Stafeto*, laŭ
permeso de la eldonistoj. La legado
estas farita de samideano Stefán
Sigurdsson.

Henry Parland :

La homo kaj la aŭtomobilo

Henry Parland estis nur 22-jara, kiam li—en 1930—iĝis viktimo de skarlatino. Du jarojn post lia morto oni publikigis la volumon *Rebrilo*, en kiu estis presataj liaj postlasitaj literaturaj provoj. Depost tiam lia renomo kreskis konstante. Li estas konsiderata kiel unu el la klasikuloj de la modernismo.

La du verketoj ĉi tie redonitaj en Esperanto estas transprenitaj el la serio de la sveda ĉefurba gazeto *Dagens Nyheter* : “La homo kaj la aŭtomobilo”, kiu siavice ĉerpis el la originala fonto, la suprenomita volumo *Rebrilo*, nuntempe malfacile akirebla. La verketoj estas pruvoj pri la terurmiksita ensorĉo laŭ kiu Parland rigardis la epokon de la maŝino.



AŬTOFANTAZIO

REFLEKTORO de aŭtomobilo ŝirfendis la nokton kaj fosis rektan, blankan sulkon tra ĝi. Ĉe la direktilo sidis figuro en flugista masko. La aero flagris kaj frapis.

La reflektoro de la aŭto fosis tra la mallumo senfinan, grizan vojon, sur kiu ĉi tie kaj tie strangaj, timemaj estaĵoj moviĝis. Ili povis esti homoj, sed ankaŭ etaj, timigitaj simioj, kies mallargaj okuloj vastiĝis je malplena

kaj senhelpa demando. Ili ensorĉite fiksrigardis la lumon, sed kiam la aŭto alglitis ilin, ilia rigardo malmoliĝis ĉe la trankvila, akra brilo. Ili ne elvojiĝis, sed malaperis sub la kaleŝaĵo, kaj la mallumo ĵetis sin sur ilin kaj ŝutplenigis la lumsulkon.

La figuro ĉe la direktilo direktis rekte antaŭen, kaj malantaŭ la aŭto la mallumo kunfalis plenigante la lumsulkon. Sed la reflektoroj elfosis novajn vizaĝojn, ili kreskis kaj mal-

pleniĝis, kaj kiam ili malaperis sub la kaleŝaĵo, iliaj okuloj respegulis iom el la malmola brilo de la fero.

La aŭto estis longa kaj gracila, nigregriza. Kiam ĝi trasiblis la nokton, kantis la fero, kaj li ĉe la direktilo komprenis kion ĝi kantas.

“La homoj kreis min”, kantis la aŭto. “Ne laŭ sia figuro, sed laŭ tiu de sia dio. Ili donis al mi ĉiajn belon kaj forton kiajn homa cerbo povas elpensi. Ili mortigis unu la alian pro mi. Mi estas fero !

“Sed kiel koncernas min tio ? Mia rigardo estas tro akra por iliaj malfortaj okuloj. Mia motoro estas miloble pli forta ol ĉiuj homaj pasioj kune. Mia spiroblovo ekkirlas iliajn dezirojn kvazaŭ polvon. Mi estas fero !

“Ili donis vivon al mi, sed nun miaj pneŭmatikoj dismuelas ilin. Kial ili vivigis min ? Ĉu ili kredis sin pli fortaj ol mi ? Mi estas fero !”

“Mi estas homo”, diris li ĉe la direktilo.

“Vi estas dio”, respondis la aŭto. “Vi mem estas fero. Ĉu vi rimarkis ilian rigardon kiam ili komprenis, ke ankaŭ ili povus iĝi dioj ? Vi kaj mi, ni trasiblos la teron kaj balaos ĝin pura”.

La homo forte premis la direktilan radon kaj sentis kiel ektremas la aŭto kvazaŭ varma, vivanta korpo. Pli da vizaĝoj aperis en la lumsulko, kaj la reflektoro senkompate elbalais la vivon el iliaj okuloj. La aŭto diris :

“Aŭdu ! La aero skuiĝas kvazaŭ ĝi disfalus en pecojn. Kaj la splitoj karesas nin. Mi estas fero. Sed mi amas vin”.


La venkokrio de la sireno disŝiris la silenton, kaj kvazaŭ lumtorpedoj la reflektoroj disfendis la nokton. Sed malantaŭe la mallumo kunfalis kaj plenigis la sulkon.

BABILAĴO PRI LA MOTORBICIKLO

La motorbiklo estas la plej temperamenta kaj obstina el ĉiuj veturiloj. Ĝi facile ekribelas, ĉiam volas veturi rekte antaŭen kaj malrespektas la kurbojn. Ĝi ne toleras virinojn kaj traktas ilin kun nekredebla sentakto. Tial estas senpripense kaj nedece, se sinjorino konfidas sin al ĝia cinika, kruda, malantaŭa sidloko.

Sendube la motorbiklo estas tipe virseksa. Sed ĝi estas tipa fraŭlo. Kvazaŭ forta mentono elstaras la antaŭa rado sub la direktilo, kies larĝa, ŝvela frunto portas stampon de decidemo kaj obstino. La malantaŭa rado kaj la framo havas kvazaŭ egoisman kaj malindulgan trajton, same la jam priparolita malantaŭa sidloko, kiu plej altgrade esprimas tiujn ecojn.

La konduto de la motorbiklo estas brua kaj sentakta. Tial ĝi ne estas tre bonvena en eleganta kaj bonkonduta societo. Ĉar ĝia temperamento estas kaprica kaj subite ĝi povas kaŭzi skandalon. Antaŭ ĉio ĝi povas iĝi speciale malagrabla kiam oni provas ekfunkciigi ĝin, aŭ sur kontraŭdekklivo. Tiam ĝi komencas esprimi sian opinion mallonge kaj forte, kraĉante ĉirkaŭ sin sian tutan provizon da blasfemoj kaj malbenoj.



La sola maniero por trankviligi ĝin estas tute ekscitigi ĝin kaj blinde ekveturegi. La urĝa veturo rapide estingas la atakon de furiozo, kaj ĝi forpasas same rapide kiel ĝi venis. Ĝis iu sensignifa interokazo igas la motorbiklon reekboli kaj perdi ĉian sinregon.

Sed se oni volas havi veran viron por kune veturadi sur longaj, malfacilaj vojdistancoj, tiam la motorbiklo estas la plej bona kamarado kiun oni povas imagi. Ĝi kunmordas la dentojn kaj ne plu kalkulas kilometrojn aŭ krutaĵojn. Kiel ŝvitperloj fluas la polvo laŭ ĝia larĝa, ventomordita fizionomio, kaj ĝi blekas pro ĝojo pri la rapido, blovo, teruritaj maljunulinoj, kiuj gapas post ĝia triumfa polvonubo.


Ĝi postulas nur unu aĵon : multe da manĝo kaj oleo. Kiam motorbiklo eksentas malsaton, oni sukcesas nenien veturigi ĝin. Se oni tamen provas konduki ĝin pluen, ĝi ŝajnigas sin malsana, trenas la radojn post si kaj entute estas la plej sendanka


aĉulo imagebla.

La motorbiklo havas tre firman mondrigardon, tiun ĉi kontraste al sia pli aĝa, ŝanceliĝema kuzo : la velocipedo, kiu hezite provas antaŭeniĝi de unu vojrandoj al la alia kaj neniam scias ĝuste kion ĝi volas. Sed la motorbiklo ĉiam veturas sur unu sama flanko de la vojo ; ĉe ni en Finnlando sur la dekstra, en kelkaj aliaj landoj sur la maldekstra flanko. Eĉ kiam ĝi veturas malsupren en la fosaĵon, ĝi faras tion en tute certa direkto. Jen plia pruvo pri la egaj obstino kaj egoismo de la motorbiklo.

La motorbiklo neniam konfesas eraron. Ĝi povas veturigi la kapon kontraŭ montflankon kaj frakasiĝi, sed oni neniam povas ĉe frakasita motorbiklo malkovri la saman pentoplenan, malfeliĉan aspekton kiel ekzemple ĉe akcidentinta aŭtomobilo. La deformita kaj distordita framo konservas ĝis la lasta spiro spitan, memfidan esprimon.

Elsvedigis : Tiheriu Morariu.





Enigma Konkurso N-ro 78

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 28 rue Stuyvenbergh, Brussel II, Belgujo. Por ĉiu tute korekta solvo oni kutime donas 5 poentojn. Ĉiufoje la tri personoj, kiuj havas la plej altajn poentnombrojn, gajnas premion. Ĉiu MA de UEA kun la sama ŝanco povas komenci la sendon de la solvoj je kiu ajn momento. Limtempo por Eŭropo estas du monatoj.

Pliaj informoj, se dezirataj, riceveblaj de S-ro Mooy kontraŭ unu respondkuponon internacia.

Solvoj :

N-ro 173 : Troa festeno estas veneno. slipo - kesto - atesti - termino - lakto - listo - rutino - panelo - sprono - mirto - generi - varti - sufoki - limako - ronki - mateno - trokeo - vindi - kitelo - oponi - sepio - pruvi.

N-ro 174 : Milionaj amasoj estas ankoraŭ mutaj kaj surdaj ekster siaj nacioj. La scio de Esperanto malfermas la pordojn de la mondo. Esperanto paĝ. 200 jaro 1952. D-ro Ivo Lapenna.

N-ro 175 : Urson al mielo oni ne tiras per orelo. Urson evitu, duonpatrinon ne incitu. Vian vivon ĝuu, sed fremdan ne detruu. Vi min manĝigos, mi vin trinkigos. Senkonscie vi agis, konscie vi pagos.


Gajnis la premiojn post kontrolo de la 74-a konkurso : S-ro J. Derieuw (Belg.) 162, S-ro T. Raimar (Norv.) 160, S-ro G. F. A. Milanowski (Germ.) 158 p.

Enigma N-ro 179 : La tuto konsistas el 152 literoj kaj formas unu strofon de konata esperanta poemo. 119-19-37-41-27-21-69 dunaskitoj; 127 83-134-148-44-71 grimpana vegetaĵo; 59-4-76-105-54-96-57-24-70-137-49 bestkuracistoj; 79-63-37-29-9-66-18-126-129-39 deklinacia kazo; 143-101-54-146-112-62-104 parto de ŝipo; 131-85-55-17-76-13-28-60-80 propravole sen ekstera influo, meminitate; 140-94-118-18-144-78-91 pusa ruĝa haŭtŝvelaĵo; 67-77-136-7-115-107-103-27-117-35 ekzaktaj reproduktaĵoj de

skribo; 75-25-71-145-42-26-150-89-84-32-91-22 homoj, kiuj faras tombornaĵojn; 1-135-40-99-108-12-29-72-21-92 edziniĝintoj; 31-15-50-45-65-130-106-110-8-102-46-56-39 eŭropanino; 114-26-122-89-45-108 mambesteto; 44-2-74-87-147-107-58-5-47-151 restaĵo el fruktoj post ekstrakto de suko; 53-149-47-132-16-52-116-30-139-36-61-97-123 homo, kiu plenumas gravan taskon (konstruon de domo ekz.); 13-124-23-43-78-86-51-32-142 speco de risorta pafarko; 90-73-37-55-109-34-25-152-128-18-82-3-111 montra pronomo aŭ adjektivo; 125-8-121-20-68-65-11-138 hindaj marĉarbaroj; 95-48-81-33-113-98-14-141-104 plej malalta universitata titolo; 64-120-38-133-12-46-97-11 homo tro amanta la komforton; 88-6-10-93-82-100-63 anilina ruĝaĵo.

Enigma N-ro 180 : Serĉu 14 naŭliterajn vortojn, kies komencliteroj formas la esprimon : BATADI LA VENTON. Poste formu el la literoj de ĉiu vorto du vortojn unu kvinliteran kaj unu kvarliteran (la du vortoj kune enhavu la 9 literojn de la originala vorto). La komencliteroj de la kvarliteraj vortoj devas formi en la sama sinsekvo la esprimon : MANO MANON LAVAS.

Enigma N-ro 181 : Por lia jubiLEO NI DONIS al li belan pentraĵon. En ĉi tiu frazo estas kaŝita la vorto : LEONIDO. Klopodu tiel kaŝi per bonaj frazoj la jenajn fruktnomojn : piro-pomo-ribo-glano-marono-figo-abrikoto-oranĝo-silikvo-olivo.



Radio kaj Esperanto

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Por somera tempo oni aldonu laŭ neceso—kutime 1 horon.
Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso, M=Muziko

Mardo	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 13.94m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	15.00–15.15	Wien. 203m. 25m. 30m. 41m. 48m. P. (ĉiun duan mardon).
	17.35–17.40	Bern. 48.66m., 31.46m., 19.60m. P. D-ro Baur.
Merkredo	15.45–16.00	Graz. 417.2m. K. (ĉiun duan merkredon) Radio Graz, Aŭstrujo.
	18.00–18.20	Roma. 25.21m., 31.35m., 49.92m. P. Radio Roma—Esperanto, Via Vitorio Veneto 56.
	19.30–20.00	Madrid. 225m., 42.33m. P. Radio S.E.U., Sección Esperanto, Diego de León 49, Madrid, Hispanujo.
	21.35–21.40	Wien. 513m., 25.46m., 48.74m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	21.45–22.15	Valencia. 43m. P. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m., 188m. I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Ĵaŭdo	07.40–07.45	Lille. 218m. I. Prof. Labit, 1 rue St-Martin, Lille (Nord), Francujo.
	08.30–08.45	Paris. 348m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	23.05–23.20	Zagreb. 264.7m. I.
Vendredo	18.00–18.20	Roma. Kiel merkrede.
	22.15–22.30	Hilversum. 402m. P. (nur 15-V, 12-VI). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. I. Rádio Ministério da Educação, Rio de Janeiro, (DF) Brazilo.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum Nederlando.

Radio Roma. Ni bedaŭras la ĉesigon de publikigo de detala programo de Radio Roma. Elsendoj okazas nun laŭ simila skemo kiel antaŭe kaj konservas sian interesan karakteron.

Ni invitas niajn legantojn daŭre aŭskulti ĉi tiun stacion, kiu provizas al ni eble la plej longan, bone aŭdeblan, profitplenan esperantlingvan elsendon. Ĉiuj raportoj, korespondaĵoj al Radio Roma, Via Veneto 56, estos bonvenaj.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 249.

4-an de Aprilo 1953

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de Marto, kaj ankaŭ, por komparo, je la sama dato en 1952 :

	1952	1953
Asociaj membroj	3046	3325
Individuaj membroj :		
MJ 576		563
MA 3058		3094
MS 385		469
Patronoj .. 8		6
DM 256		259
HM 57		58
	— 4340 —	— 4449 —
	7386	7774

DELEGITOJ

Aŭstrujo

Klagenfurt. D : F. Casar, Völkermarkter Ring 1.

Knittelfeld. FD (Turismo) : T. Zuber, Landschach 4.

Wien. FD (Citromuziko) : J. Pich, Hauptstrasse 63, Kaltenleutgeben, Wien XXV. Tel : Kaltenleutgeben 11.

Britujo

Bath. D : vakas.

Weston-s-Mare. VD : F-ino K. Osmond, 16 West Street.

Francujo

Angers. FD (Katolikismo) : M. Audouin, Rue Létanduère 155. Tel : 22-41.

Nancy. FD (Junularo) : J. P. Colnot, Pharmacie Delidon, 20 Rue St. Dizier. Tel : 68-57.

Reims. D : F-ino M. Jacotin, 190 Rue des Capucins.

Germanujo

Berlin. FD (Instruado) : U. Hoffmann, Teupitzer Strasse 111, Berlin-Neukölln. Tel : 62-43-67.

FD (Presado) : S-ino E. Hoffmann, Teupitzer Str. 111, Berlin-Neukölln. Tel : 62-43-67.

Bodenheim (Rhein). D : J. Flatters, Mainzer Str. 3.

Hauingen. FD (Kristanismo) : vakas.

Islando

Hveragerdi. D : Hermann Lundholm. Tel : 20.

FD (Ĝardenkulturo) : La D.

Japanujo

Tokio. FD (Bankaj aferoj) : S. Satojosi, 3—333 Hjakunin-ĉo, Sinjuku-ku.

Jugoslavujo

Janjina. D : Ante Marinović, Janjina-Pelješac, Dalmacija.

Ljubljana. FD (Komerco) : D. Mizerit, Ravbarjeva 9/I. Tel : 22-987.

Portugalujo

Setúbal. D : S. Rocha, Largo Santos e Silva 17.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1953

447. Simon, S-ro W., Memphis, Tenn., Usono

448. Jung, S-ro T., Scheveningen, Nederlando

449. Hicks, S-ro S. W., Bayswater, Okc. Aŭstralio

450. Maddern, S-ro I. T., Wodonga, Vic., Aŭstralio

451. Cronin, F-ino A. L., Andover, Anglujo

452. Kennedy, S-ro F., Surbiton, Anglujo

453. Laudyn-Chrzanowski, S-ino E., Newquay, Anglujo

454. Symes, S-ro L., Minchinhampton, Anglujo

455. Taylor, S-ro F. V., Albury, N.S.W., Aŭstralio

456. Leather, S-ro A. J., Blackburn, Anglujo

457. Maillard, S-ro G., Bourg-la-Reine, Francujo

458. Haugen, S-ro E. A., Trondheim, Norvegujo

459. Jacobson, S-ro J., Nordmaling, Svedujo

460. Szabad, S-ro S., Stockholm, Svedujo

461. Schenker, S-ro A., Emmenbrücke, Svislando

462. Persson, S-ro G., Hälsingborg, Svedujo

463. Stephens, S-ro D., Arden, Del., Usono

464. Heine, S-ro J., Dornbirn, Aŭstrujo

465. Konrad, F-ino J., Ottendorf, Aŭstrujo

466. Knight, S-ro F. E., Dorchester, Anglujo

467. Stone-Fry, S-ro G., London, Anglujo

468. Scarborough, S-ro F. A., Hull, Anglujo

469. Link, S-ro K., Heidelberg, Germanujo

470. Lynch, S-ro J., Dundee, Skotlando

DONACOJ al la Ĝenerala Kaso : Intersteno 5ŝ., D-ro A. Santos Matias 4ŝ., S. W. Hicks 5ŝ., H. P. Saunders 2ŝ. 6p.

DONACOJ al la Propaganda Konto : W. A. Donner 1ŝ. 6p.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Sed ni havas ĉi tiun trezoron en argilaj vazoj, por ke la treega grandeco de la potenco estu de Dio, kaj ne de ni mem.

II Kor : 4. 7.

Internacia Kultura Semajno, 3-10 Aŭgusto 1953, en Kultura Esperanto-Domo, Grésillon. Informas detale kontraŭ internacia respondkupono G. Odent, Lycée de LAON, Aisne, Francujo. Represo petata.

La loka komitato de la Beneluksa Kongreso, okazonta en Antwerpen je Pentekosto 1953 eldonas memorigan p.k. kun : 1. verda pm. de 0.80 fr. (eldonita ĉe la Brusela Kongreso de la monda poŝtunuigo en 1952 kaj figuranta la poŝtestron Fr. de Lessis—1450–1517) ; 2. oficiala poŝtstampo speciale konsentita kaj uzota nur okaze de nia kongreso. Mendu ĝin tuj—ĉar la kvanto estas limigita—ĉe T. Van Gindertaelen, Raghenoplein 9, MECHELEN, Belgujo. Prezo : unu resp. kupono por ĉiuj landoj, escepte de Nederlando (40c.) kaj Belgujo (5 fr.).

Kultura Esperanto-Domo akceptos laŭeble de junio ĝis septembrofino ĉiulandajn Esperantistojn. Eventuale iam ajn ankaŭ karavanojn. Informpeto sendota kun internacia respondkupono al Kultura Esperanto-Domo, Grésillon, BAUGE, M-et-L., Francujo. Represo petata.

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika kredo, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo. Sekretariejo : Fraterhuis, LOONOPZAND, Nederlando.

Belga Fremdultrafika Servo, Konijnenperken 109, BOSVOORDE-BRUSSEL, Belgujo, rezervas hotelĉambrojn, dissendas turismajn prospektojn (1 rpk.). Rekom-pencos pro publikigo.

Gvidfolio de Verona havebla kontraŭ respondkupono al S-ro Americo Reni, via Rovereto 6, VERONA, Italujo.

Tutmonde mi korespondas pri ĉiuj temoj : S-ro R. Lindstedt, Fack 54, DYLTABRUK, Svedujo.

Fraŭlaj Esperantistoj, 28/23 jaraj, deziras labori en grenkomerco, en farmesploro, kiel ĉefmuelisto aŭ simila laborado. Studentoj de germana muelista akademio ĝis Septembro 1953 kaj Aprilo 1954.

Parolas germanan, nederlandan, anglan kaj francan lingvojn. Galle/Erens, Deutsche Müllerschule, BRAÜNSCHWEIG, Germanujo.

Italaj grupanoj deziras korespondi kun gesamideanoj tutmondaj. Skribu al S-ino Dazzini, Casella Postale 22, MASSA, Apuania, Italujo.

Komerco, Londona fakdelegito. Bonvolu noti novan adreson : J. G. Fowler, c/o B. S. Engel Agencies, 188 Kings Cross Road, LONDON, W.C.1. Firmo eksportas ĉiujn varojn al tuta mondo. Korespondas Esperantlingve.

16-jara knabino, lernanta la hispanan lingvon, volas korespondi Esperante kaj reciproke interŝanĝi naciajn gazetojn, kun Hispana junulino. Alice Mayoh, 30 Garden Village, DARWEN, Anglujo.

La Nova kristaneco en la lumo de scienco, bazita je la universala analogio kaj je la interna senco de sankta Biblio, anoncita en verkoj de sveda scienculo kaj reformanto Em. Swedenborg, malkaŝas la misteron de homa animo kaj postmorta vivo. Postulu la traktatojn senpage. Aldonu rpk. Adr. Jan B. Vlach, Lužická 21, PRAHA XII, Ĉeĥoslovakujo.

Bahaismo. Kiu deziras informojn pri tiu nova Kredo de Baha-u-llah, la Disendito por la nuna epoko, povas ricevi ilin kontraŭ internacia respondkupono de : M. Freitas, Monte da Lapa 49—I, PORTO, Portugalujo.

9-15 jaraj geknaboj (kaj kelkaj pliaĝuloj) deziras korespondi (PI., L., PM.) kun diversaj landoj : Adreso : Esperanto, SOMERO, Finnlando.

Mi volonte interŝanĝas fotojn kaj verk(et)ojn pri speleologio (groto-esplorado) en diversaj lingvoj : Marinko Gjivoje, Vodnikova 19, ZAGREB, Jugoslavujo.

Esperantista Societo La Adriatika Stelo, poŝtfako 54, PULA, Jugoslavujo, okazigos dum la Opera Festivalo de 4a-14a de Julio ekspozicion. Granda nombro da vizitontoj estas atendata. Ni petas la tutmondan esperantistaron sendi al ni ilustritajn poŝtkartojn, leterojn, flugfoliojn, afiŝojn, broŝurojn kaj librojn. Respondo garantiata. Se estos aprobita speciala poŝtstampo niaj respondoj estos stampitaj per ĝi.

INTERNACIA FERIO-SEMAJNO 1953

**18-24.7 en Konstanz, Germanujo
kun riĉa turisma kaj kultura
programo.**

Konversacia Esperanto-kurso.

**Venu por unu semajno da amika
kunestado en internacia familio
al plej bela ferio-regiono de
Germanujo !**

Informoj kaj invitilo ĉe :

**IFS Esperanto, Grüngang 8,
KONSTANZ, GERMANUJO**

HELSINGÖR

**Internaciaj Feriaj E-kursoj
18-25 de julio**

Konversacia kurso, prepara kurso por
Cseh-metodaj geinstruontoj. Daŭriga
kurso, k.t.p.

Unu semajno inter centoj da ge-
samideanoj el 10-15 diversaj landoj.
Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis,
Ingemannsvej 9,
Aabyhøj, Danlando.

ESPERANTO

Tole-binditaj volumoj

1951 Al MA de tiu jaro 5ŝ. 6p. afr.
al aliaj 10ŝ. 6p.

1952 Al MA de tiu jaro 5ŝ. 6p. afr.
al aliaj 10ŝ. 6p.

Mendu ĉe U.E.A.

Notu, ke ni sendas volumojn po 5ŝ. 6p.
NUR rekte al la koncernaj MA.

Tri monumentoj de la mondliteraturo

varme rekomendataj de la tuta Esperanta gazetaro pro la lingva
perfekteco :

La Libro de la Spiritoj, de Allan Kardec, trad. de Porto Carreiro Neto.
Enhavanta 1018 demandojn kun detalaj respondoj pri ĉiuj
problemoj de la homa vivo antaŭ kaj post la morto.

1 vol. 532-paĝa, bonega papero, broŝ. 10ŝ. 6p., afranko 9p.

La Evangelio laŭ Spiritismo, de Allan Kardec, trad. de I. G. Braga.
Ĝi estas la plej klara eksplikado de la kristana religio el vidpunkto
spiritisma.

1 vol. 432-paĝa, broŝ. 8ŝ. 6p., afranko 8p.

Antaŭ du mil jaroj . . . de F. C. Xavier, trad. de Porto Carreiro Neto.
Historia romano pri la naskiĝo de Kristanismo kaj la Roma
politiko de la 1-a jarcento de nia epoko.

1 vol. 400-paĝa, broŝ. 15ŝ., afranko 6p.

Mendu ĉe

**Universala Esperanto-Asocio, Heronsgate, Rickmansworth,
Herts., Anglujo**